


Esperanto V-19479/58 (1989)

Bulgara Esperantisto

Esperanto
V-19479/58 (1989)

Januaro 1989



- 6 Landa konferenco de bulgara MEM-sekcio (Maria Nikolova)
 - 7 Premisoj por estontaj sukcesoj (Ĥristo Gorov)
 - 9 Jubileoj (Ĥristo Tonev, Radi Banĉevski)
 - 12 Elstara figuro en la bulgara esperantista vivo (Olga Cankova)
 - 13 Pri iama E-grupo „Ni venkos” (Lazar Gajdarov)
 - 14 Regiona revuo de E-parolo kaj kanto (Dobrinka Zagorova)
 - 15 Kalendaro de BEA por 1989
 - 19 Afero humanisma (Atanas Ilkov)
 - 21 D-rino Soja Zamenhof en GDR (El „Der Esperantist” — n-ro 2/1988)
 - 23 Lingvaj demandoj (Bernard Golden)
 - 26 Gaste ĉe Elisaveta Bagrjana (Georgi Miĥalkov)
 - 28 Juna Esperantisto
 - 30 Distroj
 - 31 Tra la mondo
 - 32 Deziras korespondi, Adresaro
- III Modo

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA.

Redaktoroj: Atanas ILKOV kaj Evgeni GEORGIEV

Redakta Konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Georgi MIĤALKOV;
Krâstju KARUCIN, Kunĉo VĂLEV, Nikola NIKOLOV,
Venelin MITEV,

Adreso de la redakcio: bul. „Ĥristo Botev” 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov” — bul. „Lenin” 117, 1113 Sofio
Eldonkvanto: 6500 ekz.

Kunlaborado: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvale litajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto” estas abonebla nur per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por aliaj landoj — 7.80 lv.

Estas organizita regula registrado de la revuo sur magnetofonbendo por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Estimataj Legantoj

Venis la Nova Jaro 1989 kaj por ni ĉiuj — redakcianoj kaj legantoj de „Bulgara Esperantisto”, ĝi estos signifoplena. Dum tiu jaro ni kune festos la 70-jariĝon de nia asocia organo. Kompreneble, ni antaŭvidas Feston de la Revuo, septembre, en Velingrad, enkadre de la E-Seminaro „Tra arbaroj kaj kamparoj”, kies programon ni anoncos anticipe — eble en la sekvonta numero de „BE”. Alia iniciato lige kun la 70-jariĝo estas nia festa jubilea numero. Ĉar „Bulgara Esperantisto” naskiĝis en julio 1919, nia jubilea numero estos la julia. En ĝi trovos lokon viaj materialoj aŭ materialoj verkitaj laŭ viaj proponoj kaj sugestoj. Do, viajn kontribuaĵojn por tiu speciala festa numero — via numero! — ni atendas ĝis la fino de marto ĉi-jara. Dum 1989 ni daŭrigos la

Dum 1989 ni daŭrigos la aperadon de la revuo en ĝia nova „kostumo”. Lige kun ĝi en la redakcio venis multaj leteroj. Ni sincere dankas al ĉiuj skibintoj pro iliaj objektivaj kritikaj rimarkoj, amikaj konsiloj kaj proponoj.

Mi ne povas prisilenti nian emociiĝon pro la unua reeĥo: s-ino Nikolova el Varna (bedaŭrinde ŝi ne skribis siajn plenan nomon kaj adreson, por ke ni danku ŝin letere) salutis nin per telegramo: „Bonvolu akcepti gratulojn okaze de la nova belaspekta kaj riĉenhava revuo! Verdan starton!”.

Ni danke konsideras la kritikon de s-anoj Cvjatko Todorov el Ŝumen kaj A. Vaitilavičius el Tallin (USSR), kiuj ne aprobis la novan revuan formaton kaj ĝian ekuzon de septembro anstataŭ de la jarkomenco. Ni konscias, ke kiom da homoj, tiom da gustoj, sed la nova formato, laŭ ni, ne nur estas pli plaĉa, sed ankaŭ pli moderna kaj pli oportuna. Aliflanke, dank’ al tiu formato ni uzas plej ŝpareme la prespaperon

Sur la unua kovrilpaĝo: Sub la gvido de sia kursgvidantino Rumjana Georgieva, junuloj el Egiptio, Gano, Maroko kaj Zimbabvo — studentoj en Bulgario, lernas obstine Esperanton.

Foto: Kirilka SAVOVA

(Daŭrigo sur paĝo 5)

Jaro 58

N-ro 1

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

NIA REVUO — 70-JARA

„Bulgara Esperantisto“ naskiĝis en julio 1919, kvankam la tempo post la kruela mondmilito tute ne favoris al simila iniciato. Malsato, malsanoj, manko de certeco pri la morgaŭa tago ne instigis al homama agado. Krome mankis papero, altaj estis la prezoj de la presservoj. Spite al ĉiuj malfacilaĵoj la unua numero aperis. Komenciĝis hela periodo. La heroaĵon faris la restintaj en Sofio membroj de Centra Propaganda Komitato (tiam nomo de Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio) Simeon N. Petkov, Stefan Minkov, Georgi Atanasov kaj aliaj. Ili kunsidis la 20-an de junio 1919 kaj decidis ekde julio komenci apelaĵi la asocian organon. Fakte tio estis efektivigo de malnova decido. La 22-an de julio 1912 en Sofio okazis la unua jarkunveno de Bulgara Esperantista Societo, kiu decidis eldonon de dulingva societa organo — gazeto „Bulgara Esperantisto“. Estis faritaj, ĉiuj preparaj laboroj por ĝia aperigo, tamen la eksplodo de la Balkana Milito rompis ĉion.

„Bulgara Esperantisto“ ne elkreskis el nuda grundo. La bulgaraj esperantistoj jam havis la riĉan ilustritan gazeton „Rondiranto“ (1901—1904), eldonatan en Plovdiv, kiu en sia lasta tria jarkolekto fariĝis organo de tutlanda Bulgara Propaganda Societo por disvastigo de Esperanto; gazeton „Bălgarski Esperantist“ (1907), celantan unuigi esperantistojn en la lando (de kiu bedaŭrinde aperis nur tri nu-

mero); gazeton „Lumo“ (1907—1910), eldonatan en V. Târnovo, fariĝinta organo de la ĵus fondita naciskala Bulgara Esperantista Ligo; riĉenhavan ampleksan revuon „Danubo“ (1910—1912), komuna organo de bulgaraj kaj rumanaj esperantistoj.

La unua numero de „Bulgara Esperantisto“ aperis en tre modesta formo — 8-paĝa, sen supersignitaj literoj, en bulgara kaj Esperanto, en nur 400 ekz. Ĝin redaktis la membroj de Centra Propaganda Komitato. La frunta artikolo estis en bulgara lingvo sub titolo „Sub la radioj de la Verda Stelo“ kaj prilumis la vivkapablon de Esperanto kaj de la esperanta movado; sekvis sur 4 paĝoj informoj pri Esperanto tra la mondo kaj sur du paĝoj enlanda movado. (Estis sciigo, ke la redakcio posedos baldaŭ sian propran esperantan presalfabeton). Ekde sekventa numero la paĝoj jam plimultiĝis al 12. La enhavo variigis — aldoniĝis artikoloj pri lingvaj demandoj, literaturaĵoj. Okazinta en aŭgusto 1919 nacia esperanta kongreso (sin nominta modeste kunveno) elektis kvinmembran redaktan komitaton: Simeon N. Petkov, Georgi Atanasov, Panajot Kolev, Rale Bojaĝiev kaj Georgi Gaŝevski. La duan jarkolekton redaktis Atanas D. Atanasov, Panajot Kolev kaj Georgi Atanasov. En la unua numero frontiĝis mesaĝo al la legantoj, en kiu eksplikiĝas la redakcia gvidlinio: publikigi serion da artikoloj en bulgara lingvo por neesperantista

publiko; konigi la mondon pri la bulgara popolo, publikigante tiucele skizojn pri la historio, moroj kaj kutimoj de la bulgara popolo kaj elektitajn pecojn el la bulgara literaturo; helpi la novajn esperantistojn perfektigi siajn konojn pri la lingvo; informi la bulgarojn (bulgarlingve) pri la esperanta movado eksterlande kaj la fremdulojn pri la movado en Bulgario esperante. Tiu gvidlinio estis konsekvence sekvata. Por ŝtopi la momentan mankon de esperantaj lernolibroj por bulgaroj la redakcio aperigis paĝojn por novaj esperantistoj. Aperis skizoj pri la historio de la bulgara popolo, tradukoj el la verkaro de Botev, Vazov, P. R. Slavejkov, Kiril Ĥristov, Elin Pelin, originalaj verkoj de Petăr Jordanov, Ilija Silvestriev. En la lasta deka numero la redakcio bilancas: „Ni ne trompeflatas nin, ke la gazeto ne havas siajn malbonajn flankojn, sed tamen ni donis la doneblan“. Kun la lasta numero la redakcio liveris al siaj legantoj allogan ujon por konservo de la tuta jarkolekto.

Dum la tria jaro de „Bulgara Esperantisto“ en la redakta komitato Ivan Dobrev anstataŭis Georgi Atanasov, la paĝoj estiĝis 16. Sentiĝis plibonigo laŭaspekta kaj laŭenhava. La kvaran

jarkolekton redaktis nur Atanas [D. Atanasov (ADA) kaj Panajot Kolev. Kiam la gazeto eniris sian kvinan jaron de ekzisto, tio estis kaŭzo por ioma fiero. En ĉefartikolo oni legas: „Bulgara Esperantisto“ estas la unua esperanta organo en nia lando, kiu atingis kvinan jaron de ekzisto“. Kiel redakciano tiutempe aldoniĝis Dimi-târ Simeonov. La eldonkvanto jam atingis 1 500 ekz. Por la sesa jaro oni antaŭvidis, ke „Bulgara Esperantisto“ aperu bulgarlingve en pli ofta periodeco kiel pure propaganda eldono, en Esperanto aperu monata gazeto „Balkana Revuo“ kiel komuna eldono de la esperantistoj en Jugoslavio kaj Rumanio. Tiu iniciato tamen ne efektiviĝis kaj la gazeto daŭre aperis kiel ĝis tiam. Okazis ŝanĝo en la redakta komitato: foriris Panajot Kolev, venis Asen Grigorov kaj Zahari Zahariev. En fruntpaĝa artikolo ADA renkontis ilin kiel freŝigantojn de la redakcio.

Esencan ŝanĝon enhave ni vidas en jarkolekto sepa (1925—1926). Ekde la somero de 1925 la Asocio komencis eldoni semajnan propagandan bulgarlingvan ĵurnalon „Esperanto“ destinitan por la vasta publiko. La bezono de propagandaj artikoloj sur la paĝoj de

La graveco de l'momento

Per unuigitaj fortoj, per senlaca sistema agado, per fervoro la bulgaraj esperantistoj akiris grandajn sukcesojn en daŭro de nur kelkaj monatoj.

Rigardante kun ĝojo, sed tamen sen ebriiĝo la rezultatojn, ni devas ankaŭ konsideri kun konvena seriozezo la momenton kaj niajn taskojn.

Unue ni devas turni grandan atenton al la instruado de Esperanto en la gimnazioj. Grava estas la respondeco de la lektoroj. La Societo jam sendis al ili instrukciojn kaj planon de la instruado. De ili ni atendas merite pravigi la donitan taskon.

Due ni devas memori, ke la sukcesoj ne devas ebriigi nin. Oni memoru bone, ke per ekscentrika senpripensa agado jam unufoje estis komprometita la esperanta afero en nia lando; kun grandaj penoj ni regajnis la ŝaton de la publiko. La pasinteco estu por ni instrua kaj ĉiam memorigu al ni pri ŝaga propagando. Ne parado kun la ideo, ne laŭtaj krioj, ne trudemo, ne sonoraj nomoj de grandaj iniciataĵoj estas bezonaj nun, sed laboro, laboro konscia, senĉesa, senigita de malmolesteco kaj de merito-serĉado.

At. D. ATANASOV
(El „Bulgara Esperantisto“,
n-ro 3/1921)

Jaro III.	Novembro 1921	Numero 3.
BULGARA ESPERANTISTO		
ABONADO: Bulgariando 20 leva Fremdlan. Unid. 1-30 sv. l. Aparia numero 10 pl.	MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO.	ABONAMENT: България 20 лева Странна 150 ш. фр. Отделен брой 2 лева
La graveco de l' momento.		
Per unuigitaj fortoj, per senlaca sistema agado, per fervoro la bulgaraj esperantistoj akiris grandajn sukcesojn en daŭro de nur kelkaj monatoj. Rigardante kun ĝojo, sed tamen sen ebriiĝo, la rezultatojn, ni devas ankaŭ konsideri kun konvena seriozezo la momenton kaj niajn taskojn. Unue ni devas turni grandan atenton al la instruado de Esperanto en la gimnazioj. Grava estas la respondeco de la lektoroj. La Societo jam sendis al ili instrukciojn kaj planon de la instruado. De ili ni atendas merite pravigi la donitan taskon. Due ni devas memori, ke la sukcesoj ne devas ebriigi nin. Oni memoru bone, ke per ekscentrika senpripensa agado jam unufoje estis komprometita la esperanta afero en nia lando; kun grandaj penoj ni regajnis la ŝaton de la publiko. La pasinteco estu por ni instrua kaj ĉiam memorigu al ni pri ŝaga propagando. Ne parado kun la ideo, ne laŭtaj krioj, ne trudemo.		

„Bulgara Esperantisto“ forfalis, la oficfala parto de sciigoj tute limiĝis kaj la gazeto ricevis pure literaturan vizaĝon. La redakcio havis la ambicion vaste prezenti en traduko la bulgarajn verkistojn kaj disponigis tutajn kajerojn al tri elstaraj aŭtoroj: Dimčo Debeljanov, Nikolaj Rajnov kaj Ĥristo Botev. Originalaĵojn aperigis Asen Grigorov, Zaĥari Zaĥariev, Dimităr Zlatarski, Petăr Dinekov, Ivan Dobrev, Atanas Lakov, Zora Mladenova. En multaj numeroj sekvis la historia studo „La bogomilsmo“ de ADA. La eksteraĵo rimarkinde pliboniĝis, la gazeto aperis sur bonkvalita papero, kun kovripaĝoj. Tiun jarkolekton redaktis Asen Grigorov kaj Zaĥari Zaĥariev.

En sia oka jarkolekto „Bulgara Esperantisto“ signifis ŝanĝis sian vizaĝon al malbono. Ĝi estis nek la pasintjara literatura eldono, nek la bulgarlingva propaganda ĵurnalo „Esperanto“. Grandformata, plejparte en bulgara lingvo, multaj propagandaj artikoloj, sen literaturaĵoj, aperanta jen 8-paĝa, jen nur 4-paĝa. La naŭa jarkolekto havis la saman aspekton, sed aperis regule 8-paĝa, kun iom da literaturaĵoj. Ambaŭ jarkolektojn redaktis Zaĥari Zaĥariev.

La krizo en BEA enprofundiĝis post la dekkvina kongreso en Vraca (1928). La kongreso ne sukcesis elekti Centran Komitaton inter la ĉefurbaj esperantistoj kaj la asocia estraro translokiĝis en la provincon — en u. Ruse. Tie translokiĝis por du jaroj ankaŭ „Bulgara Esperantisto“. La gazeto revenis al sia kutima malgranda formato, 16-paĝa, 10 kajeroj jare. La dekan jarkolekton redaktis Ivan Kotoŭ, la dekunuan — kapitano Stefan Radev, konata reakciulo. Ekskluzive de 3—4 artikoloj de kapitano St. Radev kun faŝista tendenco, la enhavo daŭrestis en progresema spirito. La belarta kaj scienca partoj estis tre kontentigaj. Vice kun la ĝisnunaj kunlaborantoj aperis novaj nomoj — David Sasonov, Ĥristo Gorov, Stefan Masârov k. a.

En Sofion „Bulgara Esperantisto“ revenis en sia dekdua jaro de ekzistado (1930—1931) sufiĉe magra. Sentiĝis la malfortiĝo de BEA. Tiutempe la

asociajn vicojn forlasis la laboristaj esperantistoj kaj fondis propran asocion. La gazeto aperis sur nuraj 4 paĝetoj en duoblaj kaj trioblaj numeroj. La redaktoro Todor K. Popov, sekretario de BEA, sin titolis simple „aranĝanto“. Sendube, al tiu stato de la gazeto influis ankaŭ jena fakto. Ekde januaro 1931 en Sofio komencis aperi grandformata, ilustrita 16-paĝa revuo „Balkana Konkordo“ cele konigi unu popolon al alia sur la Balkanoj. Estis redaktoroj el Bulgario, Jugoslavio kaj Grekio. Ĝi estis tre riĉenhava: literaturo, scienco, politiko, turismo. Bedaŭrinde de ĝi aperis nur 7 numeroj.

Dektria kaj dekkvara jarkolektoj aperis sub la redaktado de Simeon Hesapĉiev. Videbla pliboniĝo ne rimarkiĝis. La amplekso kreskis al 8 paĝoj, literaturaĵoj preskaŭ mankis. La dekkvara jarkolekto havas nur 7 numerojn. Revenon al la tradicio ni vidas ekde la dekkvina jarkolekto (1933—1934), kiam la redaktadon transprenis la sperta literaturisto Ivan H. Krestanov. La spaco ne plimultiĝis, la numeroj aperis duoblaj en 16 paĝoj, tamen la enhavo tre variĝis, la fruntpaĝoj ornamigis per bildoj — vidindaĵoj el la lando, bildoj de pentristoj bulgaraj, portretoj de naciaj eminentuloj. Tiu praktiko konserviĝis en la sekvaj jarkolektoj kaj fariĝis tradicio. Ivan H. Krestanov forlasis la redakton pro trookupateco post la lasta kajero de la sekva dekseka jarkolekto, sed la grundo por modernigo de la gazeto, kiun li metis, restis. La deksepan kaj parton de la dekoka jarkolekto redaktis Zaĥari Zaĥariev, Ivan Dobrev kaj Belĉo Oktomvrijski. Novan paŝon al plibonigo de la enhavo faris la redaktoroj Asen Grigorov kaj Emil Stratev, transprenante la redaktadon ekde n-ro 9—10 (majo 1937) de la dekoka jarkolekto. Ili redaktis la deknaŭan jarkolekton, tamen iliaj nomoj malaperis de sur la paĝoj de la gazeto, praktiko, kiu daŭris en la sekvantaj jaroj. Tiutempe la polico postulis, ke ĉiu periodaĵo havu respondecan redaktoron antaŭ la polico. Tiun malagrablan taskon volonte prenis sur sin la veterano Petăr Jordanov, kies nomo aperadis sur la kajeroj. Sub kies redakta-

do aperis la dudeka jarkolekto mi ne povis elserĉi. Ekde la dudekunua jarkolekto la redaktadon transprenis prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, kio daŭros ĝis la malpermeso de la gazeto en 1942. Helpis al prof. Ĝuĝev kaj fakte redaktis la sindona aktivulo Ivan Keremidĉiev-Esperov. La lasta numero antaŭ la malpermeso estas la dubla 5—6-a numero de majo-junio 1942.

La periodo 1936—1942 reliefigas kiel aparte fruktodona por „Bulgara Esperantisto”. Kun la influo de la laboristaj esperantistoj en BEA efektiviĝis la unueco de la movado en la lando. La asocia organo multe kontribuis por plifortigi kaj plivastigi la movadajn vicojn. Ĝia eldonkvanto kreskis al 1 800 ekz. Sur la gazetaĵoj oni pridiskutis gravajn asociajn problemojn — paco kaj interkompreniĝo inter la balkan-landaj popoloj, homara progreso. Multiĝis la kunlaborantoj.

Tuj post la popola venko je la 9-a de septembro 1944 la esperanta movado en la lando reviviĝis. Jam komence de oktobro 1944 ekfunkciis la Centra Komitato. En aŭgusto 1945 aperis la unua numero de la grandformata ilustrita revuo „Internacia Kulturo”, eldonata monate en 16 paĝoj. Ĝi anstataŭis „Bulgara Esperantisto”. La revuo estis redaktata perfekte, enhavis problemajn soci-politikajn kaj primovadajn artikolojn, literaturaĵojn, tradukajn kaj originalajn. „Internacia Kulturo” bone evoluis kaj baldaŭ fariĝis komuna organo de balkanlandaj esperantistoj, pli poste eĉ de apudnubaj esperantistoj, kun internacia redakta komitato. Malgraŭ ke sur ĝiaj paĝoj konstante aperis abundaj materialoj pri enlanda movado, la Centra Komitato de BEA decidis komenci la eldonadon de „Bulgara Esperantisto” kiel organo de BEA kaj de Bulgara Esperantista Kooperativo. En julio 1946 aperis la unua numero de ĝia 24-a jarkolekto, en sia kutima formato, 16-paĝa, entute en bulgara lingvo. Ĝi enhavis organizajn informojn pri BEA kaj BEK, lingvajn demandojn, instigis al internacia korespondado, informis pri eksterlanda movado. Tiu jarkolek-

to finiĝis per 6 numeroj, la 25-a — per 12 numeroj. La gazeton redaktis ĝis la 8-a numero de la 25-a jarkolekto Ivan Sarafov, poste la redaktadon surprénis Ivan Keremidĉiev-Esperov. En 1948 anstataŭ „Bulgara Esperantisto” aperadis sporade 4-paĝa aldono al „Internacia Kulturo”. De ĝi aperis 5 numeroj. Ekde 1949 komenciĝis stagna periodo de la bulgara esperanta movado, malgraŭ ke „Internacia Kulturo” aperadis, ĉefe dank’ al penadoj de BEK, ĝis 1950.

Revigliĝo en la landa movado sentiĝis en 1954, kaj dum la sekvanta jaro komencis aperi modesta stencilita „Bulteno”, organo de BEA kaj BEK. Ĝi signife kontribuis por antaŭenpuŝi la movadon, kaj en 1956 okazis la 32-a landa esperanta kongreso, kiu markis disfloron de la movado, ĉiam kreskanta ĝis la nuna tempo. En 1957 la Centra Komitato decidis renovigi la eldonadon de „Bulgara Esperantisto”. En julio 1957 aperis la unua numero de ĝia 26-a jarkolekto, stencilita 12-paĝa, bonaspekta. Ĝin lerte redaktis Violin Oljanov. La gazeto havis sufiĉe varian enhavon, en ĝi trovis lokon ankaŭ literaturaĵoj. Tiu jarkolekto finiĝis per 7 numeroj. La sekvanta 28-a jarkolekto aperadis jam tipografie presata. La malfacilaĵoj lige kun ĝia presado estis tre grandaj. La numeroj aperis neregule, ofte duoble kaj trioble. La tuta jarkolekto, 12 numeroj, aperis nur sur 94 paĝoj. Feliĉe la malfacilaĵoj finiĝis en la sama jaro.

Ekde 1959, la 29-a jaro de ĝia aperado, „Bulgara Esperantisto” surpaŝis la vojon de sia triumfa marŝo daŭranta feliĉe ĝis la nuna tempo. Regule la gazeto aperas en 12 kajeroj jare, ilustrita, kun kovriloj. En 1980 ĝi ŝanĝis sian eksterajn, aperante en pli granda formato, same 16-paĝa. Nova ŝanĝo de la formato okazis pasintjare, ek de 9-a numero. La formato malgrandiĝis iomete, sed la kajeroj jam estas 32-paĝaj, presitaj sur luksa papero. La eldonkvanto konstante kreskis: de 2 000 ekz en 1959 al 3 000 ekz. en 1961, 4 500 en 1968, 5 000 en 1974, 6 100 en 1976, 6 500 en 1982. Pli ol 1 500 ekz. disvastiĝas eksterlande, plejparte en Sovetunio. Ĝi stabiĝis

kiel solida, riĉenhava gazeto. Sur ĝiaj paĝoj aperas artikoloj pri gravaj sociaj eventoj en la lando kaj eksterlande, pri scienco, arto, turismo. Abundas la materialoj pri enlanda esperanta movado, pri la movado eksterlande, aparte en Sovetunio, kie ne ekzistas esperanta periodaĵo, pri lingvaj problemoj, oni disponigas paĝojn pri la junularo kaj por infanoj. La redakcio atente kaj konstante flegas kunlaborantojn. Kelkfoje ĝi organizis seminariojn kun siaj korespondantoj en la lando, invitis kontribuantojn el eksterlando. Por stimuli la originalan kaj tradukan belliteraturon ĝi multfoje organizis literaturajn konkursojn. Kunlaboris en la gazeto ne nur konataj aŭtoroj el la pli frua periodo, elreskis vico da novaj nomoj: Nevena

Nedelĉeva, Ljuba Bojaĝieva, Miĥail Ĝobanov, Rajna Konstantinova, Ivan Draganov, Miĥail Ŝekerĝiev, Venelin Mitev, Georgi Miĥalkov, Penka Batoeva, Penka Papazova, Dimităr Denĉev, Neli Abaĝieva, Danĉo Danĉev, Ŝinka Filaretova k. a. Ĝi disponigis lokon ankaŭ pri verkoj de eksterlandaj aŭtoroj.

Post la stagna periodo revuon „Bulgara Esperantisto” redaktis, helpe de diversmembra redakta komitato, sinsekve jenaj redaktoroj: Violin Oljanov (1957—1960, 1962—1964), Canko Murgin (1961), Ivan Sarafov (1964—1968), Kunĉo Vălev (1968—1980), Donĉo Ĥitrov (1981—ĝis aprilo 1988), Maria Jankova (ekde majo 1988).

Krâstju KARUCIN

Estimataj Legantoj



kaj gajnas aldonan spacon. Ni devis fari la ŝanĝojn fine de la jaro pro du kialoj: unue, ni devis montri al niaj legantoj kiel aspektos la revuo venontjare kaj fakte pruvi al ili, ke la plialtigo de la abonkotizo ne estas arbitra, sed respondas al la pli bona kvalito de nia eldono. Kaj krome, tiamaniere ni iomete trejnus nin, esplorante la novan presmanieron ĝis la jarfino.

Sed ni revenu al viaj leteroj: ni sincere dankas al la veterana esperantisto kaj multjara ĵurnalisto Nikola Aleksiev pro lia utila kaj detala analizo de n-ro 9/1988; pro la reeĥoj de la E-veterano el Ruse Jordan Kalinov kaj de la ĵurnalisto el Jamboŭ Dimo Trudoljubov; ankaŭ al Bojanka Prodanova el Gabrovo, Dimităr Simeonov kaj Vasja Cvetkova el Sofio. La lasta skribis al ni: „Mi gratulas la novan aspekton de „Bulgara Esperantisto”. Ĝi estas vere eleganta revuo — nova vesto, konvena formato, interesaj rubrikoj, bonkva-

litaj fotoj, nova tekniko — ĉio estas plaĉa. Brave!”. Grantuloj venis ankaŭ de niaj perantoj Paul Hewitt el Britio kaj Adonis Gonzalez Meana el Hispanio; de nia leganto el GDR Siegfried Wagner kaj de nia malnova amiko kaj kunlaboranto el Tallinn Johannes Palu, kiu skribas: „Mi volas gratuli vin, ĵus ricevinte la novan septembran numeron de via revuo. Mi estis plaĉe surprizita — kia agrabla formato! Kaj la enhavo nova, pli diversa, interesa! Gratulojn!”. Mi finos la revuon de gratuleteroj responde al la redakciaj streboj por plibonigo de „BE”, menciante ankaŭ la saluteleterojn de nia malnova kaj regula kunlaboranto el Hungario s-ro Bernard Golden kaj de la redaktorino de gazeto „Heroldo de Esperanto” s-rino Ada Fighiera-Sikorska, kiu interalie skribis: „Hieraŭ mi ricevis la novan „BE” kaj mi devas diri, ke la ŝanĝo estas granda! Do, bondezirojn kaj gratulojn!”

Viaj leteroj, estimataj legantoj, daŭras veni. Mi dankas ankaŭ al ĉiuj, pri kiuj ni ne menciis ĉi-supre. Tion ni faros perletere.

Maria JANKOVA



Glitistino

Foto: Kirilka SAVOVA

Landa konferenco de bulgara MEM-sekcio



La 29-an de oktobro 1988 en urbo Drjanovo okazis Konferenco de la Bulgara MEM-sekcio, dediĉita al la 35-a datreveno de la fondo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Ĝin partoprenis la membroj de la estraro de Bulgara MEM-sekcio, reprezentantoj de aliaj bulgaraj E-sekcioj, la prezidanto de E-societo „Iv. Vladkov“ en Drjanovo Geno Manev kaj delegitoj el la tuta lando — entute ĉeestis 92 geesperantistoj.

La konferencon gvidis la aktiva pacbatalanto Ĥristo Manolov.

La urbestro Dimităr Dimitrov salutis la ĉeestantojn kaj bondeziris al ili fruktodonan laboron. Salutparolis ankaŭ Fani Miĥajlova — sekretario de la Internacia MEM-Komitato.

Pri temo „Nuntempa etapo de la batalo por paco kaj malarmado kaj partopreno en ĝi de la Mondpaca Esperantista Movado“ prelegis la prezidanto de Bulgara MEM-sekcio Dimităr Haĝiev. Li substrekis, ke „la batalo por paco kaj malarmado nun troviĝas en nova etapo, intime ligita al la proceso de renovigo (perestrojka) en la socialismaj landoj.“

La raporto de Veneta Baleva, redaktorino en revuo „Paco“ temis: „MEM-gazetaro kaj ties rolo en la porpaca laboro“.

Ĥristo Manolov raportis pri la rolo de individua kaj kolektiva korespondado kaj internaciaj ligoj en la batalo por paco.

Pri la vivo kaj laboro de la esperantisto-antifaŝisto d-ro Vârban Genĉev okaze de 70-jara datreveno de lia naskiĝo parolis prof. d-ro K. Popov. Pri sia korespondado kun pli ol 100 geesperantistoj el 39 landoj el ĉiuj kontinentoj kaj pri riĉaj rezultoj de tiu agado raportis Maria Taŝeva.

Multaj ĉeestantoj tre aktive partoprenis la diskutojn, aliaj faris proponojn. En la nomo de la estraro de BEA kaj de Patrolanda Fronto, emfazinte, ke batalo por paco estas plej grava laboro, la konferencon salutis la prezidanto de BEA Sava Dâlbokov.

Konsiderante la proponojn faritajn en la raportoj kaj

de apartaj delegitoj, la konferenco decidis:

— Bulgara MEM-Sekcio daŭros aktivi kunlabore kun la Nacia Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro, kun la Bulgara Nacia Komitato por Defendo de la Paco kaj kun la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto. Tiamaniere ni atingos pli indajn agojn por defendo de la monda paco.

— Sub gvido de la Bulgara MEM-sekcio kaj de la Estraro de BEA, la esperantistoj en Bulgario organizu ankoraŭ pli efikan batalon defende al la paco, kontraŭ la armado de Eŭropo kaj tutmonde. Por tiu celo la bulgaraj organizitaj esperantistoj devas apliki ankoraŭ pli efikajn metodojn kaj uzi Esperanton serve al la paco. Tial ĉiu organizita membro de BEA devas esti aktiva membro de MEM.

Estis akceptita plano por la agado de Bulgara MEM-sekcio dum 1989.

Fine la partoprenantoj en la konferenco elektis novan sekretarion de la Bulgara MEM-sekcio — Maria Taŝeva, kaj sendis telegramojn al la Prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes, Hungario, al Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM kaj honora membro de UEA, al Georgi Dimitrov-Goŝkin — Prezidanto de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco; al Boris Cvetkov (Nacia Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro — Sofio; al Monda Konsilio por Paco (Helsinki, Finnlando); al la Ĝenerala Sekretario de UN Javier Perez de Cuellar (Novjorko, Usono).

Per la menciitaj telegramoj la konferenco esprimis la volon de la bulgaraj esperantistoj batali por paco.

La konferencanoj vizitis la novan muzeon en Drjanova-monaĥejo kaj la muzeon de la popola arkitekto Koljo Fiĉeto. La partoprenantoj en la konferenco metis florojn sur la monumentojn de la esperantistoj d-ro Vârban Genĉev, Ivan Iliev Vladkov kaj Botjo Penev Ganĉev, heroe pereintaj en la batalo kontraŭ faŝismo, por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Maria NIKOLOVA

PREMISOJ POR ESTONTAJ SUKCESOJ

Antaŭ dek jaroj, en 1979, en Moskvo estis fondita la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Ĝi estas daŭriganto de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo (SEU), kies naskiĝjaro estas 1921.

Kiel sciante la unuaj Esperanto-pioniroj estis grandparte rusoj aŭ ruslandanoj, kio videbliĝas el la Adresaro de esperantistoj, eldonita de Zamenhof en 1889. Ĝi enhavas mil adresojn, el kiuj okcent apartenas al rusoj. Tial oni nomas tiun periodon „rusa”. Intime ligitaj kun tiu periodo estas la nomoj de Devjatnin, Lojko, Kofman, Borovko, Evstifeev, Garnet k. a. La plimulto el ili estis la unuaj Esperanto-verkistoj. Ekz. V. Devjatnin, poeto kaj tradukisto, kiu kontribuis al la klasika „Fundamenta Krestomatio”, V. Garnet, kunfondinto de revuo „Lingvo Internacia”, tradukisto kaj publicisto; N. Borovko, poeto kaj publicisto, al kiu Zamenhof skribis en 1895 sian faman leteron pri la deveno de Esperanto; S. Poltavski, literaturisto; A. Kofman, poeto kaj tradukisto.

En sia „Historio de Esperanto” Edmond Privat substrekis la altan socian idealismon, kiu ligis la unuajn rusajn esperantistojn al Esperanto. Tiu idealismo

kaŭzis starigon de pli intimaj rilatoj kun la granda rusa verkisto L. Tolstoj. Tamen tuj post kiam aperis en revuo „Esperantisto” en 1895 artikolo de Tolstoj, la cenzuro malpermesis ĝian disvastigon en Ruslando. Apenaŭ en 1905 dum la unua rusa revolucio d-ro Ostrovskij el Jalta ricevis permeson eldoni revuon sub titolo „Esperanto”. Pli poste en Petrogrado ekaperis „Ruslanda Esperantisto”. La populara gazeto „Vestnik Znaniija” en daŭro de unu jaro eldonis belan kaj riĉenhavan aldonon „Espero”. Sekvis „Ondo de Esperanto”.

La periodaĵoj preparis la grundon por tutlanda organizaĵo. Fine de 1908 la societoj „Espero” kaj „Esperantisto” kunfandiĝis kaj fondis Ruslandan Ligon Esperantistan.

La Granda Oktobra Socialisma Revolucio liberigis la movadon el la katenoj de la cenzuro kaj polico. Kiel funkcioj post pluvo kreskis societoj kaj grupoj en diversaj lokoj.

En 1921 okazis la 3-a Tutruslanda Kongreso, kiu proklamis la fondon de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo (SEU). La kongreso elektis prezidanton kaj centran komitaton. Sed antaŭenpuŝo venis nur en 1925, kiam la aŭtoritataj institucioj proklamis la neceson de starigo de konscie gvidata internacia eduklaboro por la laborulaj amasoj. Tiu ĉi eduklaboro estis efektivigata dank’ al la internacia korespondado. Nun siajn servojn prezentis la esperantistoj. Ili proponis partoprenon en la laboro de Proleta Esperanto-Korespondado (PEK). Tio altiris la atenton de la aŭtoritatoj al Esperanto kiel atentinda kultura faktoro. En multaj lokoj ŝtataj, sindikataj kaj partiaj instancoj subtenis Esperanton, helpis al ĝia gvidado kaj organizado. Esperanton favoris la gvidaj sociagantoj Lozovskij, Ma-nuilskij, Petjakov.

La PEK-centro troviĝis en Leningrado. Ĝiaj gvidantoj estis Podkaminer, Majorov, Ruvinskij. Ili kontaktis kun la gvidantoj de PEK en aliaj landoj. Nur dum 1933 estis interŝanĝitaj pli ol 50 000 PEK-materialoj. Miloj da laboristoj kaj kamparanoj estis okupataj per la internacia korespondado. La sukcesoj de PEK-laboro estis prezentitaj en formo de raporto al la 17-a partia kongreso.

La amasa PEK-laboro favoris la organizon staton de SEU. La 5-a kongreso raportis pri 25 mil membroj kaj studentoj en jenaj respublikoj — rusa, ukraina, blank-rusa, tatara, armena k. a.

Sendube la gvidantoj de SEU faris multon por sukceso de Esperanto en Sovetio. Ili meritas menciojn: E. DREZEN — prezidanto de SEU, aŭtoro de gravaj prilingvaj verkoj, membro de la Lingva Komitato; G. DEMIDJUK — membro de CK de SEU. Redaktoro de „Bulteno de CK de SEU” kaj „La nova epoko”. LK-ano; N. INCERTOV — membro de CK de SEU, LK-ano, redaktoro de periodaĵoj de SEU; N. NEKRASOV — membro de CK de SEU, redaktoro de „Juna mondo” kaj „La nova etapo”. Poeto kaj tradukisto; E. SPIRIDOVIĈ — membro de CK de SEU, aŭtoro de vortaroj. Teoriulo. Aŭtoro de prilingvaj studoj; D. SNEJKO — membro de CK de SEU, aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj, gvidanto de la Medicina Sekcio de SEU; G. SEVAK — membro de CK de SEU kaj prezidanto de Armena Komitato de SEU, LK-ano; S. RUBLJOV — membro de CK de SEU, LK-ano, aŭtoro de lernolibro kaj vortaro;

E. IZGUR — membro de CK de SEU, prezidanto de Esperanta organizaĵo en Kremenciŭk, poeto, „Heroo de laboro”; E. MIĤALSKI — organiza sekretario de la organizaĵo de verkistoj, Poeto, re-

daktoro; V. JAVORONKOV — membro de CK de SEU, organizanto de la Esperanto-movado inter blinduloj; A. POSELUEVSKI — prezidanto de Turkmena Komitato de SEU; A. ERJUĤIN — membro de CK de SEU, gvidanto de PEK en Arĥangelsk.

Vigla estis la internacia agado de SEU. Ĝi efektiviĝis kiel de CK de SEU, tiel de la PEK-centro en Leningrado, ankaŭ de la ĉeloj en sindikataj domoj.

CK de SEU laŭplane eldonis pli ol ducent librojn — socipolitikaj, ekonomiaj, prilingvaj, beletraj, originalaj kaj tradukaj. Aperadis regule „Bulteno de CK de SEU”, gazeto „Sur posteno” kaj revuo „La nova etapo”.

Sur la internacia kampo SEU subtenis morale kaj materiale la klasbatalan Internacion de Proletaj Esperantistoj (IPE) kaj ĝian organon „Internaciisto”.

Al la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV) aliĝis dudek konataj sovetaj verkistoj — N. Nekrasov, E. Miĥalski, N. Hohlov, E. Izgur, G. Sevak, E. Spiridoviĉ k. a.

Delegacioj de SEU partoprenis la kongresojn de IPE. Krome SEU estis preta kunlabori kun ĉiuj neŭtralaj organizoj, kiuj deziras kunlabori kun ĝi sur la kampoj kultura kaj antimilita.

Tre malfavora situacio por

internacia agado kreiĝis post kiam Hitler kaptis la regopotencon en Germanio, okupis Aŭstrion kaj Ĉeĥoslovakion. Malgraŭ la monstra antisoveta propagando esperantistoj el diversaj landoj daŭre simpatiis al Sovetlando. Jen fragmento el letero subskribita de 26 interbrigadistoj-kubanoj kaj sendita al fervojista klubo en Kaluga:

„Ni, loĝantoj de lando tro malproksima de la via, certigas al vi, ke se la faŝismo atakos Sovetion, ni estas pretaj defendi ĝin kaj ree batali, kiel ni faris tion en Hispanio. Ni konsideras, ke nia devo estas defendi la grandan landon de la laboristaro”. (El „Internaciisto”, majo, 1939).

En la Patrolanda Milito pereis centoj da esperantistoj, sed la restintaj vivaj altenlevis la verdan standardon post ĝia venka fino. Jen karaj nomoj: Podkaminer, Bokarev, Sevak, Miĥajlov, Gusev, Andrianova, Palu, Ojalo, Krajnov, Segal, Poliŝĉuk, Danovskij, Isaev k. a.

Dank’ al iliaj penadoj, la movado reviviĝis kaj en 1979 estis fondita Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kun filioj en pluraj respublikoj.

Nun, kiam en Sovetio okazas grandaj ŝanĝoj — publikeco, demokratiigo kaj renovigo — kreiĝas premisoj por estontaj atingoj de Esperanto.

Aristo GOROV

Solenaj tagoj en Ŝumen



Okaze de la 80-jara jubileo de II Kongreso de BEA, okazinta en Ŝumen, la urba E-societo „Vekiĝo” organizis la 1-an kaj la 2-an de oktobro ĉi-jare solenan celebren de tiu rimarkinda evento en la vivo de la bulgaraj esperantistoj.

La gastoj el la tuta lando trarigardis la E-standon en la urba librovendejo „Nahodka”, kie ili aĉetis E-literaturon kaj lernilojn. Per du grandaj aŭtobusoj la gastoj ekskursis al la ŝumena montplataĵo, kie ili vizitis la Monumenton de la kreintoj de la bulgara ŝtato kaj la Malnovan urbon. La Interkonan Vesperon partoprenis pli ol 200 esperantistoj el 35 loĝlokoj kaj E-societoj en la lando.

La 2-an de oktobro je la 9-a horo matene en la Domo de Profesiaj Unuiĝoj okazis la ĉefa jubilea solenaĵo. En la fumsalono oni povis vidi ĝis nun ne publikigitajn arĥivajn fotojn de la unuaj tagoj de la E-movado en Ŝumen.

Ĉeestis multaj veteranoj de nia movado — inter ili Atanas Bojaĝiev, Ivan Smokov, D. Ilkov, docento Georgi Dimov — gasto el Varna.

Salutparolis la prezidanto de E-societo „Vekiĝo” Ĥristo Tonev. Raporton pri la 80-jara jubileo faris Cvjatkto Todorov — membro de la Centra Estraro de BEA. Li rakontis al la ĉeestantoj interesajn kaj nekona-tajn ĝis nun faktojn el la historio de la societo. Ĝiaj fondintoj estas Ilija Silvestriev, Dojĉo Kolev — oficisto en stacidomo Ŝumen; Dimităr Kânĉev — librovendisto-presisto; Ilija Todorov — juĝoficisto; Ksenofon Jankov — abituriento; Kosta Haĝivâlkov — ĉapelisto; Ivan Kamilarov — vickuracisto; la instruistinoj Careva, Dobrevka kaj An. Radeva, la lernantoj Jor-danka Silvestrieva (kiu forpasis ĉi-jare, 99-jaraĝa) kaj

Simeon Filipov. La junaj entuziasmoj kudris silkan standardon, kiun oni konservas ĝis nun kiel karan relikvon.

Post kiam la raportanto sekvis koncize la historian evoluon de la societo, li speciale traktis la II-an kongreson de BEA, kiu estas aparte grava pro la fakto, ke la bulgaraj esperantistoj estis la iniciatintoj por interkompreniĝo kaj kunagado de la popoloj loĝantaj sur la Balkana Duoninsulo. En la arkivoj de „Vekiĝo”, de BEA, de Distrikta Arkivo en Ŝumen kaj aliloke estas konservataj valoraj informoj pri tiu kongreso. Ĝin partoprenis grupo da rumanaj esperantistoj ĉe-kape kun d-ro Robin el Bukureŝto.

Dum la kongreso estis elektita estraro gvidata de Ilija Silvestriev kaj Ksenofon Jankov. Entuziasme oni akceptis Rezolucion, aprobanta la laboron de la kongreso, kaj decidon pri translokiĝo de la sidejo de BEA kaj de la Redakcio de la asocia revuo „Lumo” de V. Târnovo al Ŝumen. Unuanime estis akceptita kaj sendita gratula telegramo al la kreinto de la lingvo Esperanto — d-ro Zamenhof. Oni esprimis siajn laŭdon kaj dankon al la urbaj aŭtoritatoj en Ŝumen pro la bona gastamo kaj koran dankon al la rumanaj esperantistoj pro ilia unua gastado en Bulgario.

Post ĉi tiu kongreso Ŝumen estiĝas centro de la E-movado en Bulgario dum pli ol 3 jaroj. Tio destinas la pluan ŝtorman disvolviĝon de „Vekiĝo”, kiun pro ĝia multjara, naciutila, kultura kaj porpaca agado oni juste honoris per ordeno „Kiril kaj Metodi” — I-a grado, per du oraj medaloj por pacbatalo fare de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco, kaj estas portanto de la Honora Signo de urbo Ŝumen. „Vekiĝo” estas la sola societo en nia lando distingita per la Honor-insigno de la tutmonda E-movado por paco. (MEM).

Post la raporto salutparolis: Dimităr Petkov — E-societo, G. Orjaĥovica, Vâlka Dobrevă — E-societo, Pleven, Radka Stojanova — E-societo, Razgrad, Boris Angelov — E-societo, Smoljan kaj en la nomo de la E-societo, Miĥajlovgrad — la juna esperantisto, 14-jara lernanto Atanas Nikolov.

Pro aktiva E-instrulaboro kaj pro aktiva organiza agado ok personoj estis distingitaj per diplomoj kaj

per la libro de Ivan Vazov „Sub la-jugo“ tradukita en Esperanto.

Antaŭ la gastoj de la solenaĵo oni prezentis riĉan belartan programon. Oni faris fotojn, kiuj memorigos al pli ol 200 esperantistoj pri la agrablaj horoj pasigitaj en Ŝumen.

Ĥristo TONEV

Poŝtista konferenco



De la 23-a ĝis la 25-a de septembro 1988 en Internacia E-Kursejo — Pisanica, okazis la 10-a Nacia Konferenco de la Poŝtista Esperanto-Sekcio ĉe BEA, dediĉita al la 20-jara jubileo de la sekcio.

Ĝian laboron partoprenis ĉirkaŭ 30 gekolegoj el la tuta lando kaj gastoj el Francio, Finnlando kaj Sovetunio.

Antaŭ la ĉeestantoj estis prezentitaj en Esperanto jenaj raportoj kaj prelegoj: „La 20-jara jubileo de la Poŝtista Esperanto-Sekcio kaj reorganizo“ de Draguŝko Petrov — prezidanto de la sekcio; „Centjaraj radioondoj“ de dipl. inĝ. Veikko Mäki-Luopa el la Poŝto kaj Telekomunikado en Helsinko (Finnlando); „Disvastigo de la komunikaj servoj en nia lando kaj en la

internacia nivelo-stato kaj perspektivo“ de Ivan Jordanov; „La estonteco de la komunikado estas en ĝia ciferado kaj integrado“ de inĝ. Georgi Stoilov — kandidato de la teknikaj sciencoj ĉe la Scienc-Esplora Instituto de la Kuminikado en Sofio.

Lige kun la raportoj okazis viglaj diskutoj. En la nomo de la Franca PTT-Esperanto-Sekcio la kolemino el Parizo Raymonde Perault salutis la partoprenantojn, bondezirante sukcesojn en nia estonta laboro. Ŝi donacis al nia sekcio medalon „100 jarojn Esperanto“ de la Franca Esperanto-Asocio. Estis trailegitaj salutleteroj de gekolegoj el Hungario, GDR kaj Ĉeĥoslovakio.

D. S.

Sukcesa ILEF-festivalo

Ĉi-jare Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF) celebras sian 25-jaran jubileon. Ĝi estis fondita en 1963 dum la 48-a UK de Esperanto en Sofio. Dum sia kvaronjarcenta ekzistado ILEF faris multon diskonigante mondscale, en diversaj socimediaj, la atingojn de la internacia E-movado, propagandante Esperanton per la plej modernaj rimedoj de komunikado kaj dokumentado — filmoj, fotoj, kaj magnetofonaj surbendigoj.

La unua kreaĵo de ILEF estis dokumenta filmo pri la 49-a UK de Esperanto „Flirtas verdstelaj flagoj...“. Ĝin iniciatis kaj filmis Bulgara Esperantista Kino-foto-klubo. Sekvis multaj novaj atingoj: filmoj pri la UK de Esperanto en Varna (1978), en Antverpeno (1982), „Verdaj steloj en „Slânčev brjag“ (1984) k. a. Estis or-

ganizitaj internaciaj foto-ekspozicioj kadre de diversaj E-kongresoj en Sofio, Varna, Antverpeno, Aŭgsburgo, Budapeŝto.

En 1985 ILEF kun granda sukceso okazigis sian Unuan Kino-Foto-Festivalon en la Internacia E-Kursejo en Pisanica.

Nia plej granda sukceso tamen estas la unuhora kolora dokumenta filmo „Esperanto“ dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto, kreita laŭ iniciato de la prezidanto de ILEF Donĉo Ĥitrov kunlabore kun la elstara pola kinoreĝisoro Roman Dobrzynski. La filmo estis prezentita kun granda sukceso dum la jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio 1987.

Dank' al la gastamo kaj fervora helpo de la esperantistoj el urbo Vraca (Bulgario), sub la alta protektado

de la urbestro inĝ. Asen Nedjalkov, de la 10-a ĝis la 15-a de oktobro 1988 ILEF sukcesplene okazigis sian Duan Internacian Festivalon, kies devizo estis: „Por paca mondo, pura ĉielo kaj amikeco“.

Dum la festivalo per filmoj, fotoj kaj diapozitivaj sin prezentis esperantistoj el 15 landoj: Sovetunio, Usono, Britio, Francio, Belgio, Nederlando, FRG, Hispanio, GDR, Italio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Japanio, Bulgario, Pollando.

La aranĝoj de la bunta festivala programo okazis en la kino-salono kaj video-klubejo de la Kemia Kombino, kiuj disponigis al pli ol 40 partoprenantoj ĉiusepecan projekcitekton kaj plej favorajn kondiĉojn por agrabla kaj fruktodona laboro.

La solena inaŭguro de la festivalo okazis la 11-an de oktobro matene en la video-klubejo. Salutojn kaj bondezirojn al la partoprenantoj direktis la vicurbestro de Vraca Veselin Dilanovski kaj la prezidanto de la sindikata organizaĵo ĉe la kombino inĝ. Ivan Bojinov. Festparolis la prezidanto de ILEF Donĉo Ĥitrov. Li koncize skizis la historion kaj la atingojn de ILEF dum la pasintaj 25 jaroj, substrekante, ke ĝi estas unu el la plej aktivaj fakaj organizaĵoj en kadre de UEA.

La festivala programo komenciĝis per projekciado de la filmo „Esperanto“. Estis prezentitaj (retrospektive) la filmoj „Flirtas verdstelaj flagoj“, „Leciono de Esperanto“, „Verdaj steloj en Slanĉev brjag“ kaj „Trifon Ĥristovski“ — emocia vivskizo pri la eminenta bulgara esperantisto-komunisto kaj publicisto Tr. Ĥristovski, kies biografia libro „Mia vivo“, tradukita en Esperanto, jam estas mondkonata. Lia frato Dimitar Ĥristovski, oficiale invitita partopreni la festivalon, kortuŝe rakontis pri la malfeliĉa sorto de Trifon, kies firma volo tamen venkis la insidan malsanon. Kaptis la atenton de la publiko la kolora filmo pri la Unua ILEF-festivalo — „Ĉarmaj Rodopi“ kreita de nia hispana amiko José F. Arroyo. Tio estas altvalora verko bonege spegulanta la belajn de la bulgara naturo kaj la bulgaran nacian karakteron.

En la Domo de Kulturo ĉe la Kemia Kombino estis aranĝita Internacia Foto-Ekspozicio el pli ol 35-foto-kolektoj de ILEF-anoj. La arta nivelo de la foto-konkursoj estis alta. La ekspozicion oficiale inaŭguris la ĝenerala direktoro de la kombino inĝ. Ilia Iliev, kiu emas organizi E-kursojn por laboristoj.

En la festivala programo sin prezentis la kino-klubo de la sindikatoj kaj de la faka mezlernejo „Avangardo“ el Vraca kun filmoj kaj fotoj — multaj el kiuj tre altnivela.

La loĝantoj de Vraca kaj la amaskomunikiloj montris grandan intereson al la aranĝo (kvankam esperantista!). La Ministrerio de Komunikado eldonis specialan poŝtkoverton kaj stampilon kun la emblemo de ILEF.

Per Speciala Premio de la urbestro de Vraca estis distingita la filmo „Esperanto“. Tri Grandaj Premioj „Arĝenta Kolombo“ estis aljuĝitaj al la filmo „Ĉarmaj Rodopi“, al la Sofia E-kinoklubo „Verda objektivo“ pro ĝia kolekto de fotografiaj kaj al doc. Kiril Velkov el Vraca pro lia kolekto de diapozitivaj.

Estis aljuĝitaj ankaŭ kelkaj specialaj premioj de la sindikatoj en Vraca — al la esperantisto-veterano Koljo Markov el Sofio pro lia foto-kolekto; de la Komso-molo en Vraca, al la kino-foto-klubo „Avangardo“ kun gvidanto Ivanka Koleva; de E-societo „Sukceso“ — Vraca, al Kiril Kalĉev el Loveĉ pro lia kolekto de raportaj fotoj. La specialan premion de la Estraro de ILEF ricevis ĝia sekretario Veneta Baleva pro ŝia sindona kunlaborado.

Unuan premion la ĵurio aljuĝis al Stojan Pavunĉev, Ĥristo Nikolaev kaj Georgi Stojkov (BG), al Aleksandar Kovaljov kaj Leonid Kolesnikov (USSR) kaj al Arnau Torras i Tutusaus (Hispanio) pro iliaj artaj fotoj. Estis aljuĝitaj ankaŭ duaj, triaj kaj kuraĝigaj premioj.

La Dua Festivalo de ILEF denove pruvis, ke la entuziasmo kaj la strebado al ĉiam pli altaj artaj kaj teknikaj atingoj ĉe la membroj de la organizo estas realaĵo.

Radi BANĈEVSKI
Foto: Kiril KALĈEV



Elstara figuro en la bulgara esperantista vivo

● ANTAŬ 120 JAROJ NASKIĜIS GEORGI AKTARĜIEV

Georgi Aktarĝiev* naskiĝis la 6-an de oktobro 1868 en Veliko Târnovo. Li estis la unua el la ses infanoj de Anastasia kaj Georgi Genĉov Aĥtarĝiev. La knabo havanta inklinon al fremdaj lingvoj kaj matematiko lernis en la gimnazio de sia naskiĝurbo. Pro sia sanstato li bezonis ŝanĝon de la klimato, tial la patro sendis lin en la rumanan urbon Braŝov. Tie li daŭris studi en la loka Klasika Gimnazio. Poste, en Vieno, Georgi Aktarĝiev studis klasikan filologion kaj revenis Bulgarion kiel specialisto pri fremdaj lingvoj. Li posedis pli ol 10 lingvojn — klasikajn kaj modernajn.

Ĝis la fino de sia vivo Georgi Aktarĝiev oficis en Sofio kiel interpretisto kaj ĵurnalisto. Krome, li estis kunfondinto de la Societo de Ĵurnalistoj en Sofio.

Kun Esperanto kaj ĝia ideo pri interkompreniĝo de la homoj Georgi Aktarĝiev konatiĝis en 1898. Dank' al sia emo al fremdaj lingvoj li ellernis la Internacian Lingvon, alproprigis ĝiajn riĉajn esprimeblecojn. „Kiel poligloto li mem ne bezonis Esperanton, sed Esperanto bezonis lin” — diradis liaj samtempuloj. Al lia plumo apartenas tiel bonstilaj E-tradu-

koj, kiel same recenzoj pri la Esperanta literaturo.

Georgi Aktarĝiev famiĝis kiel sperta propagandanto de Esperanto. En sia artikolo „Kiel ni devas propagandi Esperanton?” li asertas, ke tio estas delikata afero, kiu postulas, ke „ni studu la karakteron de la homoj”. Pro tio en 1903, per speciala demando, li faris sociologian esploron koncerne la publikan opinion pri Esperanto. Poste, en 1924 kune kun la bulgara literaturisto, folkloristo kaj etnografo akad. Miĥail Arnaudov, per trafaj argumentoj, li refutis iujn bulgarajn filologojn, kiuj konsideris la lingvan kreaĵon de d-ro Zamenhof nescienca.

Notindas la agado de Georgi Aktarĝiev celanta la organizon de bulgara esperantista vivo. Laŭ la modelo de la Societo por Propagando de Esperanto (SPPE) en Francio, en diversaj landoj estis starigitaj similaj kaj samnomaj organizaĵoj. En 1903 kelkaj esperantistoj en Sofio iniciatis tian societon en Bulgario. Georgi Aktarĝiev estis ĉefrolulo en tiu entrepreno, kiun helpis la organo de la E-klubo en Plovdiv — gazeto „Rondiranto”, kun redaktoro Georgi Oreŝkov. Estis publikigita la Regularo de la Bulgara Societo

por Propagando de Esperanto, kies organo fariĝis g. „Rondiranto” kun redaktoro Georgi Aktarĝiev (kiu fakte gvidis tiun Societon pereintan post nelonge). En 1907 fondiĝis Bulgara Esperantista Ligo (nun Asocio) kaj Georgi Aktarĝiev estis kelkfoje elektita kiel ĝia prezidanto. Li ankaŭ membris en la Redakcia Komitato de la organo „Danubo”.

Georgi Aktarĝiev estis ne nur tre klera esperantisto, sed samtempe tre modesta kaj grandanima homo. Li estis alirebla por ĉiuj esperantistoj dum la E-aranĝoj. La maldekstraj esperantistoj kromnomis lin Marx kaj ofte oni sin adresas al li per la vorto „kamarado”.

La fratoj de Georgi Aktarĝiev — Zaĥari, Zdravko kaj Ĥristo, ankaŭ estis esperantistoj. La filo de Zaĥari — profesoro pri farmakognozio. Ĥristo Aĥtarĝiev regis plurajn fremdajn lingvojn kaj Esperanton.

Georgi Aktarĝiev mortis la 30-an de julio 1933. Lia nomo eniris la Oran Libron de UEA eldonitan en 1937, okaze de la 50-jariĝo de Esperanto.

Oлга CANKOVA

* En sia familia nomo Georgi Aktarĝiev anstataŭigis la literon H per K.

PRI IAMA E-GRUPO „NI VENKOS“

Pri unuopaj esperantistoj en u. Karlovo estas informoj jam en 1904, sed pri organizita esperanta agado ni povas paroli nur depost 1914, kiam entuziasmaj lernantoj fondis la lernantan Esperanto-grupon „Ni venkos“.

Gimnazio „Vasil Levski“ en Karlovo estis, kaj ankaŭ nun estas, fonto de scienca, kleriga kaj kultura agado. La gelernanta junularo ĉiam alte tenis la torĉon de idealismo, de progresemaĵoj. Kaj ne mire, ke en 1914, kiam la lando apenaŭ estis eliranta el la Balkana Milito, kiam jam komenciĝis la kruela Unua Mondmilito, la lernantoj fondis lernejan Esperanto-grupon kaj nomis ĝin per la esperplena nomo „Ni venkos“. Inicijatintoj estis Ivan Radkov, Ivan Dobrev kaj aliaj. La grupo viglis du-tri jarojn.

En la postmilita 1919 jaro grupo „Ni venkos“ renoviĝis kaj reorganiziĝis. Ĝi nombris 10 anojn. Prezidanto fariĝis Ivan Radkov, sekretario Cvjatko Cvetkov, raportanto Ivan Dobrev. Al la VI Nacia Esperanto-kongreso (modeste nomita kunveno), okazinta en Sofio la 24-an de aŭgusto 1919, la grupo sendis kiel delegitojn Nedko Karcev kaj Dimităr Koprinarov. En 1920 la grupo jam havis 33 membrojn kaj malfermis kursojn. Dum la jaro 1921 la regularo de „Ni venkos“ estis aprobita fare de la gimnazia direktoro kaj de la Klerigministerio. La grupo havis stampilon: ronda, kun surskribo „Grupo Esperantista. Karlovo. Bulgarujo“ kaj en la mezo kvinpinta stelo. Dum tiu periodo en Karlovo, en la teknika mezlernejo, instruis la konata esperantista aganto Ivan Krestanov. Li

faris prelegojn pri Esperanto, gvidis esperantan kurson kun 150 gelernantoj kaj alian kurson por komunista junularo.

La grupo „Ni venkos“ iniciatis la fondon de Junulara Esperanta Ligo en Bulgario kaj fariĝis ĝia centro ĝis 1924. La Ligo grupigis la junularajn kaj lernantajn organizaĵojn kaj societojn el multaj urboj kaj vilaĝoj de la lando. En 1924 en Karlovo komencis aperi bulgarlingva monata gazeto „Nova Zvezda“ (Nova Stelo) kiel organo de Junulara Esperantista Ligo. Ĝi estis sufiĉe ampleksa gazeto por scienco kaj arto, pri la organizaj problemoj de la junularo. Ĝin redaktis Cvjatko Cvetkov kaj Zahari Boĉev. Bedaŭrinde post sia 7-a kajero ĝi ĉesis aperi.

Lazar GAJDAROV
eksmembro de la grupo „Ni venkos“

Enscenigo de bulgara vintra popolfesto.

Foto: Silva ZAKARJAN



Regiona revuo de E-parolo kaj kanto

La 15—16-an de oktobro j. k. en urbo Loznica okazis Regiona Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto. En la programo partoprenis esperantistoj el Varna, Razgrad, Ŝumen kaj Târgoviște.

Antaŭ la malfermo de la Revuo okazis ĵurnalista konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de la Bulgara Televideo, de gazetoj „Oteĉestven Front“, „Vâzhod“ (Supreniro), „Lozniška Iskra“ (Fajrero de Loznica), de la loka radiocentro k. a. D-ro Ivan Kirĉev — prezidanto de la E-Kulturdomo en Razgrad, malfermis la konferencon kaj parolis pri la rolo de la internacia lingvo Esperanto en la praktiko, pri ĝia uzado en la scienco.

La dommastroj de la Revuo multe klopodis pri la bona akcepto de la gastoj, prezentante al ili varian programon, inkluzivantan diskovesperon en Junulara Domo, ekspozicion de aplika arto en la antaŭsalono de la legejo en urbo Loznica, ekskurson al la loko „Jumruka“ (Pugno).

La programo de la Revuo komenciĝis la 16-an de oktobro je la 15.30 horo en la salono de la legejo. En daŭro de 3 horoj sin prezentis 22

kolektivaj kaj individuaj interpretantoj. Ilia plenumon pritaksis ĵurio kun prezidanto Ivanka Dakovska el Bulgara Esperanto-Teatro, Sofio. La speciala premio de la E-Kulturdomo estis aljuĝita al grupo „Aleni Makove“ (Ruĝaj Papavoj) kun gvidanto Josif Ivanov por kanto; unuan premion por muzikspektaklo ricevis la grupo el u. Târgoviște kun gvidanto Maria Rajĉeva. Per unua premio por recitalo estis distingita la grupo por E-parolo ĉe la E-Kulturdomo kun gvidanto Tonja Stefanova. La individuaj plenumantoj Neli Dejanova por versaĵo kaj M. Veskova por kanto — ambaŭ el Razgrad, ricevis la premion de la Komunuma Komitato de Komsomolo en u. Loznica. La emociaj plenumoj de Elena Koĵuĥarova, Bonka Stefanova kaj Boris Florov el E-societo „Espero“ — Varna, akiris la simpatian de la publiko kaj oni atribuis al ili la unuajn premiojn kaj al Boris Florov el

Varna por kompleksa individua plenumo oni enmanigis diplomon de CE de BEA kaj la specialan premion de la E-Kulturdomo. La ensemblo de Radka Stojanova el u. Razgrad prezentis la popolkutimon „Lazaruvane“ en Esperanto, pro kio gajnis duan premion. La gvidantino de la ensemblo sciigis, ke ilia monpremio estos disponigita por bezonoj de la Nacia Fonduso „1300 jarojn Bulgario“.

Post la anonco de la premiitoj, kiujn oni allasas al la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto, Ivan Ĉulev el CE de BEA enmanigis la Oran Medalon de BEA al d-ro Ivan Kirĉev pro lia multjara agado kiel prezidanto de la eksa Distrikta Estraro de BEA en Razgrad kaj bondeziris, ke li ankoraŭ multajn jarojn restu entuziasma aktivulo en la vivoj de la E-movado.

Nia Regiona Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto ĝis ia grado donis imagon pri la nobla misio de Esperanto kaj provokis intereson ĉe neesperantistoj.

Dobrinka ZAGOROVA

Koran dankon!

Dank' al nia fama aktorino Belka Beleva bulgaraj nevidantaj esperantistoj ricevis novan E-sonlibron.

En surbendigejo de la Asocio de Blinduloj en Bulgario ŝi surbendigis por ili sian libron „Teatro sen lingvaj barieroj (travivitaj rememoroj)“.

Sur la libera spaco de la lasta kasedo ŝi surbendigis fragmentojn el

la libro de Vasja Cvetkova „Vojaĝimpresoj pri Japanio“.

Fine de la surbendigaĵo Belka Beleva turnas sin al siaj legantoj: „Per tiu ĉi surbendigo mi donacas al vi, estimataj gesamideanoj, mian malgrandan korean laboron“.

Bulgaraj nevidantaj esperantistoj kore dankas al sia kara legistino kaj

bona amikino por tiu ĉi vere valora donaco, ĉar per ŝia libro ili havas eblecon pli proksime konatiĝi kun la unika Esperanta teatro-arto.

Vladimir JELEV,
sekretario de la Sekcio
de Bulgaraj Nevidantaj
Esperantistoj ĉe BEA

KALENDARO

Aranĝoj de Bulgara Esperantista Asocio dum 1989

JANUARO

- 14.01.89 — Miĥajlovgrad: Regiona Renkontiĝo por Interŝanĝo de Sperto de esperantistoj el Norda Bulgario — Vidin, Vraca, Pleven, Miĥajlovgrad. Organizanto: E-societo „Septembra Gloro“, 3400 Miĥajlovgrad, P. K. 6.
- 14—23.01.89 — Vraca: Nacia Kurso de Esperanto. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio bul. „Ĥr. Botev“ 97.
- 25—27.01.89 — IEK-Pisanica: Seminario por la oficistoj de BEA. Organizanto: Komisiono por Organiza Agado ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. „Ĥr. Botev“ 97.

FEBRUARO

- 26—27.02.89 — Razgrad: Festivala Renkontiĝo de Ensembloj por Politikaj Kantoj kun konkursa kaj libera (laŭdezira) programo. Organizanto: E-Domo de Kulturo-Razgrad, 7200 Razgrad, str. „Ivan Vazov“ 38, Vĥ. 3, ap. 33, Radka Stojanova.

MARTO

- 18.03.89 — Pravec: Regiona Renkontiĝo de Junaj Esperantistoj. Organizanto: E-societo „Standardo de la paco“, Pravec, departemento de Sofio, bl. 18, Vĥ. A, ap. 2, Cvetanka Lilova.
- 25—26.03.89 — Burgas: Departementa Revuo de la E-Parolo kaj Kanto. Organizanto: E-Domo de Kulturo-Burgas, 8000 Burgas, str. „Lermontov“ 29, Vĥ. I, E-societo „Nigra Maro“, Enjo Kostadinov Enev.
- 25—26.03.89 — Veliko Târnovo: Regiona Renkontiĝo pri temo „Esperanto en la

kultura vivo“. Organizanto: E-societo „Lumo“, 5000 Veliko Târnovo, P. K. 226, Angel Nedjalkov.

APRIL

- 1—2.04.89 — Stara Zagora: Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto, kun internacia partopreno. Organizanto: E-Domo de Kulturo-Stara Zagora, 6000 Stara Zagora, ul. General Gurko 34, E-societo „Verda Stelo“, Ĵivko Ĵelev.
- 1—10.04.89 — Sofio: Kvalifika Kurso. Organizanto: Centra Instituto por Kvalifiko de Instruistoj kaj Gvidkadruloj.
- 1—10.04.89 — Vraca: Aprila Nacia Kurso. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio bul. Ĥr. Botev 97.
- 3—9.04.89 — IEK-Pisanica: Nacia Specialigita Terminologia Kurso por Matematikistoj kaj Fizikistoj. Organizanto: Komisiono por Instrua Agado ĉe BEA, 1303 Sofio bul. Ĥr. Botev 97.
- 8—10.04.89 — Sofio: Nacia Printempa Renkontiĝo de Junaj Esperantistoj. Organizanto: Junulara Sekcio (BEJ) ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.
- 8—9.04.89 — Pleven: Regiona Renkontiĝo „Storgozia'89“. Organizanto: E-societo „Eterna Amikeco“, 5800 Pleven, str. Canko Cerkovski 14, Vâlka Dobrev.
- 22—23.04.89 — Loveĉ: Tradicia Renkontiĝo „Siringa Vespero“. Organizanto: E-societo „Espero“, 5500 Loveĉ, str. Dimitâr Pâškov 22, Asen Matev.

MAJO

- 12.05.89 — Plovdiv: Nacia Renkontiĝo de Medicina E-Sekcio. Organizanto: Medi-

cina Sekcio ĉe BEA, 1303 sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

6—7.05.89 — Varna: Nacia Renkontiĝo de Veteranoj-Esperantistoj. Organizanto: Sekcio de Veteranoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

6—7.05.89 — Dimitrovgrad: Konkurso-Recitalo „Penjo Penev“. Organizanto: E-societo „Georgi Dimitrov“, 6400 Dimitrovgrad, bul. D. Blagoev 5—A, Tonĉo Tonev.

13—14.05.89 — Bjala Slatina: Seminario por Aktivuloj en la Kampo de Internacia Agado. Organizanto: Komisiono pri Internacia Agado ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

13—14.05.89 — Stara Zagoro: Nacia Renkontiĝo de Agronomoj-Esperantistoj. Organizanto: Sekcio de Agraraj Specialistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

13—14.05.89 — Razgrad. Kvizo pri temo „Bulgario — lando de turismo“. Organizanto: „E-Domo de Kulturo — Razgrad, 7200 Razgrad str. Ivan Vazov 38, Vĥ. 3, ap. 33, Radka Stojanova.

13—14.05.89 — Razgrad: Nacia Renkontiĝo de Kolektantoj-Esperantistoj. Organizanto: Sekcio de Kolektantoj-Esperantistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

20—21.05.89 — Ruse: Tradicia Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PA-RE). Organizanto: E-societo „Libero“, 7000 Ruse P. K. 425, Nadeĵda Sirkova.

22—27.05.89 — Loveĉ: Kvalifika Kurso por Instruistoj-Nespecialistoj. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

22—31.05.89 — Sofio: Partopreno de BEA en la Monda Filatela Ekspozicio „Bulgario'89“. Organizanto: Komisiono pri Kultura Agado ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

24—25.05.89 — Sliven: Nacia Konferenco de Matematikistoj-Esperantistoj. Organizanto: Sekcio de Matematikistoj-Esperantistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

26—28.05.89 — Vraca: IX Internacia

Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto. Organizantoj: Komitato de Kulturo, CK de la Komsomolo, Supera Teatra Instituto „Kr. Sarafov“ Sofio, Boteva Organiza Komitato, Vraca, E-societo „Sukceso“, Vraca, 3000 Vraca, P. K. 66, Stojan Pavunĉev.

28—30.05.89 — Vraca: Renkontiĝo de Gvidantoj de E-Teatroj kaj Kulturaj Festivaloj, kun internacia partopreno. Organizantoj: E-societo „Sukceso“, (3000 Vraca, P. K. 66) kaj Ŝtata Pupteatro — Vraca.

majo/junio 89 — Plovdiv: Internacia simpozio „Ekologizado kaj antiekologizado de la jonosfero kaj Komunismo“. Organizanto: Internacia Ekologia Asocio kun partopreno de la Sekcio de Ekologoj-Esperantistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

JUNIO

1—4.06.89 — Karlovo: Seminario „Esperanto kaj scienc-teknika progreso“, kun internacia partopreno. Organizantoj: Scienc-Teknika Sekcio ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97 kaj E-societo „Vasil Levski“, 4300 Karlovo P. K. 44.

3—4.06.89 — Karlovo: Nacia E-Renkontiĝo „Rozo'89“. Organizanto: E-Societo „Vasil Levski“, 4300 Karlovo, P. K. 44.

3—4.06.89 — Ĥaskovo: Naciaj Ŝak- kaj Go-turniroj. Organizantoj: E-societo „Prof. Asen Zlatarov“, 6300 Ĥaskovo P. K. 68, Nikola Uzunov kaj Junulara Sekcio (BEJ) ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

9—11.06.89 — Sofio: IV Turistaj Esperantistaj Tagoj. Organizanto: Sekcio de Turistoj-Esperantistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

10—11.06.89 — Stara Zagora: Solenaĵoj lige kun la 85-jariĝo de E-societo „Verda Stelo“ — Stara Zagora. Organizanto: E-societo „Verda Stelo“, 6000 Stara Zagora, str. General Gurko 34, Jivko Jelev.

17—18.06.89 — Gabrovo: Festo de la Hu-

muro kaj Ŝerco, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Verda Torĉo“, 5300 Gabrovo, P. K. 10, Maria Avramova.

17—18.06.89 — Varna: Tradicia Mara Amika Renkontiĝo Esperantista — (MARE'89), dediĉata al Varna kaj al la maro. Organizanto: E-societo „Albatroso“, 9000 Varna, str. Batak 4, ap. 18, Ivanka Stojanova.

29—30.06.—12.07.89 — Ŝumen: Esperantista Renkontiĝo, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Vekiĝo“, 9700 Ŝumen, P. K. 60, Ĥristo Enĉev.

Junio 1989*: Regionaj seminarioj kun la estraroj de la lokaj E-organizaĵoj. Organizanto: Komisiono pri Organiza Agado ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

JULIO

1—20.07.89 — IEK-Pisanica: Internaciaj Kursoj de I, II, III kaj Instrurajta Gradoj. Organizantoj: Internacia E-Kursejo kaj Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

14—16.07.89 — Orjaĥovo: E-Renkontiĝo „SIERO'89“, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Georgi Stanev“, 3300 Orjaĥovo, str. Sofijska 14, Nadejda Bosjaška.

14—24.07.89 — Târgoviște: Esperantista Ŝak-Festivalo, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Amikeco“, 7700 Târgoviște, P. K. 174, Todor Todorov.

15—20.07.89 — Veliko Târnovo: VII Internacia Somera E-Universitato (ISEU). Organizanto: E-societo „Lumo“, 5000 Veliko Târnovo, P. K. 226, Angel Nedjalkov.

21.07.—9.08.89 — IEK-Picanica: Kursoj de I, II, kaj III gradoj. Organizantoj: IEK, 1000 Sofio, str. Pozitano 40 kaj Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

AŬGUSTO

10—29.08.89 — IEK-Pisanica: Kursoj de I, II, III kaj instrurajta gradoj. Organizan-

toj: IEK, 1000 Sofio, str. Pozitano“ 40 kaj Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

Aŭgusto 1989* — Vilaĝo Sâdievo: Internacia Esperantista Junulara Brigado. Organizantoj: E-Domo de Kulturo, 8000 Burgas, P. K. 303, Elena Stojkova kaj E-societo „Aglo“, 8500 Ajtos, str. „Ivan Komitov“ 1.

Aŭgusto 1989* — Pleven: Internacia Esperantista Junulara Brigado. Organizantoj: E-societo „Eterna Amikeco“, 5800 Pleven, str. Canko Cerkovski 14, Vâlka Dobrev kaj E-Domo de Kulturo, 5800 Pleven, str. Mir 20—A, Ceko Filipov.

14—23.08.89 — Pirin-montaro: IX Esperantista Turista Marŝo, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Esperanto Triumfonta“, 2850 Petriĉ, str. Goce Delĉev 8, Kiril Ĥlebarov.

15—30.08.89 — Vidin-Silistra: Internacia Danuba Remado „TID'89“. Organizanto: Sekcio de Turistoj-Esperantistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

24—27.08.89 — Ruse: Internacia Konferenco de Komunistoj-Esperantistoj. Organizanto: Komisiono por Internacia Agado ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

SEPTEMBRO

1—15.09.89 — IEK-Pisanica: Ĉe-metoda kurso, I grado. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

1—3.09.89 — IEK-Pisanica: Nacia Instruista Konferenco. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

4—6.08.89 — IEK-Pisanica: Seminario de Instruistoj el la Socialismaj Landoj kaj de la Estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

6—8.09.89 — IEK-Pisanica: Seminario pri Interlingvistiko. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

6—10.09.89 — IEK-Pisanica: Internacia seminario pri temo „Sciencoj humanismaj kontraŭ sciencoj ekzaktaj“. Organizanto: Junulara Sekcio ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

18—28.09.89 — Velingrad: E-Seminario „Tra arbaroj kaj kamparoj“, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Stojo Kalpazanov“, 4600 Velingrad, P. K. 7, Boris Gaĝanov.

30.09—1.10.89 — Plovdiv: IX Renkontiĝo de Esperantistoj-Vegetaranoj. Organizanto: Sekcio de Vegetaranoj-Esperantistoj, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

OKTOBRO

2—7.10.89*: Renkontiĝo de la Klubo de E-Parolantoj. Organizanto: Instrukomisiono ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

7—8.10.89 — Kjustendil: E-Renkontiĝo „Frukta Vespero“. Organizanto: E-societo „Flamo“, 2500 Kjustendil, str. Pautalia 5, Georgi Kaljaŝki.

13—15.10.89 — Vraca: Literatura Seminario pri temo „Internaciismo en la Esperanta literaturo“, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Sukceso“, 3000 Vraca, P. K. 66, Stojan Pavunĉev.

14—15.10.89 — Pleven: Nacia Konferenco de Poŝtistoj-Esperantistoj. Organizanto: Sekcio de Poŝtistoj-Esperantistoj ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

19—22.10.89 — Petriĉ: montodomo „Belasica“: X Kaŝtanvespero. Organizantoj: Komisiono pri Internacia Agado ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97 kaj E-societo „Esperanto Triumfonta“, 2850 Petriĉ, str. Goce Delĉev 8, Kiril Ĥlebarov.

21—22.10.89 — Razgrad: Scienca Konferenco pri temo „Rolo de la E-kulturo en

la scienco kaj kultura vivo de la lando“. Organizanto: E-Domo de Kulturo — Razgrad, 7200 Razgrad, str. Tolbuĥin 2, Sonja Stefanova.

27—29.10.89 — Pleven: E-Renkontiĝo „Kunfratoj'89“ kaj Recitalo el la poezia heredaĵo de Cvetan Spasov, kun internacia partopreno. Organizanto: E-societo „Eterna Amikeco“, 5800 Pleven, str. Canko Cerkovski 14, Vâlka Dobrev.

28—29.10.89 — Karnobat: Departementa Pedagogia Seminario. Organizanto: E-Domo de Kulturo-Burgas, 8000 Burgas, P. K. 303, Elena Stojkova.

NOVEMBRO

14—15.11.89 — Bjala: Solenaĵo lige kun la 60-jariĝo de E-societo „Paco“. Organizanto: E-societo „Paco“, 7100 Bjala, departemento de Razgrad, str. Georgi Dimitrov 63, Petko Vladov.

DECEMBRO

8.12.89 — Jambol: Regiona Renkontiĝo „Zamenhofa Vespero“. Organizanto: E-societo „M. Gorki“, 8600 Jambol, departemento de Burgas, str. G. Georgiev 8, P. K. 25, Dimitâr Ĥristov.

8.12.89 — IEK — Pisanica: Nacia Junulara Studenta Renkontiĝo. Organizanto: Junulara Sekcio ĉe BEA, 1303 Sofio, bul. Ĥr. Botev 97.

9—10.12.89 — Razgrad: Festo de la E-Kulturo en Razgrad. Organizanto: E-Domo de Kulturo, 7200 Razgrad, str. Tolbuĥin 2, Tonja Stefanova.

Decembro 89* — Stara Zagora: Kvalifika Kurso por Instruistoj. Organizanto: Centra Instituto por Kvalifiko de Instruistoj kaj Gvidkadruloj.


Noto de la Redakcio: La eventoj en nia kalendaro plano signitaj per asterisko (*) ne havas ankoraŭ ĝustan daton aŭ lokon de okazigo. Por pliaj informoj, bonvolu, turni vin al la organizantoj!

AFERO HUMANISMA

Veturante tra la montaraj loĝlokoj en la Balkano, en Rodopi- kaj Pirin-montaroj — tie, kie plej bone konserviĝis la bulgara spirito, vian atenton altiras diversaj surskriboj sur fontoŝtonoj kaj pontoj. Enirante preĝejojn kaj monaĥejojn, vi vidas portretojn ne nur de sanktuloj, sed ankaŭ de plej ordinaraj homoj — la donacintoj. Tiel, per koncizaj surskriboj kaj modestaj portretoj, ikonpentristoj eternigis por la generacioj, tiujn verajn patriotojn — la donacintojn. Konforme al la kristana tradicio, ili nomiĝas „kitori“.

Fakte, informojn pri donacemo en la bulgara ŝtato ni havas de post akcepto de la kristanismo en 864/865 dum la regado de princo Boris. Tradicie preskaŭ ĉiuj bulgaraj princoj kaj caroj faris donacojn al preĝejoj, monaĥejoj, kulturaj centroj — la fajrujoj de nia mezepoka kulturo. Impresajn informojn pri similaj aktoj ni trovas dum la regado de la granda mecenato kaj bonfaranto — caro Ivan Aleksandăr (1331—1371), kiam la bulgara mezepoka regno travivas sian lastan ekonomian kaj kulturen progreson antaŭ la turka invado. Oni konservis la Zografan Ĉarton (1342), la Mračkan Ĉarton (1347) kaj la Mesembriajn Ĉartojn — ĉirkaŭ 1352, per kiuj caro Ivan Aleksandăr donacis grandajn monsumojn al la Zografa kaj Mračka monaĥejoj kaj konstruigis kelkajn preĝejojn en la nigramara kastelo Mesembria.

De pura kristana tradicio, privilegio de la mezepoka aristokrataro, dum la Renesanco la donacemo fariĝis afero de granda parto de la bulgara popolo. La juna bulgara burĝaro ekstaris ĉe-kape de la batalo por nacia, kultura kaj eklezia libereco kaj ĝi vivigis la donacemon. La bulgara popolo bezonis ne nur preĝejojn kaj monaĥejojn, sed ankaŭ modernajn lernejojn. Pro tio parto de la bulgaraj komercistoj ne ŝparis sian monon. Ekzemple per rimedoj de fratoj Palauzov kaj Vasil Aprilov, en urbo Gabrovo estis malkovrita en la jaro 1835 la unua laika lernejo en Bulgario. La bulgara scienculo Petro Beron, studinta medicinon en Hajdelberg, kiu ĝis la fino de sia vivo okupiĝas pri fiziko, kemio, filozofio kaj medicino, lasas riĉan heredaĵon, per kiu dum pluraj jaroj oni subtenis la bulgaran gimnazion en Odrino. Post la liberigo elsub osmana jugo la fratoj Evlogi kaj Ĥristo Georgiev testamentis grandajn



monrimedojn por konstruo de la nuna Sofia Universitato. Speciala estis la zorgo por la bulgaraj komunumoj kaj lernejoj, restintaj ekster la limoj de la nova bulgara ŝtato. Laŭ iniciato de Ivan Evstatiev Gešov, gvidanto de la plovdiva popola partio, la bulgara gimnazio „Sanktaj Kirilo kaj Metodij“ en Saloniko ricevis mil orajn lirojn.

La multjarcenta tradicio ne perdis sian vivopovon ankaŭ en nia nuntempo. Dum la tutpopolaj festoj lige kun la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato (1981) estis kreita ŝtata—publika organizo „Fonduso-13 jarcentojn Bulgario“. Al ĝia adreso estis senditaj multaj donacoj de privataj personoj kaj publikaj organizaĵoj. La fonduso zorgas ankaŭ pri



ФОНД ИЗ ВЕКА БЪЛГАРИЯ



Emblemo de la Fonduso
„1300 jarojn Bulgario“

elspezo de la rimedoj laŭ deziro de la donacinto. Ĝis nun, dum la sep jaroj de ekzistado de „Fonduso „13 jarcentojn Bulgario“ estis ricevita pli ol 110 milionoj da levoj kaj pli ol 50 milionoj da levoj en formo de objektoj.

Grandan kontribuon al la nuntempa donacemo havas niaj samnacionoj, kiuj loĝas eksterlande. Antaŭ kelkaj jaroj la bulgarioj vivantaj en Aŭstrio kolektis rimedojn por konstruo de kultura centro kaj hotelo en Sofio por bulgarioj vivantaj alilande. Ilija Denev, antaŭ multaj jaroj elmigrinta en Brazilion, donacis al la bulgara popolo unikan kolekton el gigantaj naturaj kristaloj, per kiuj estis metita la komenco de la plej nova muzeo en Sofio nomita „La tero kaj la homoj“. Donacantoj estas ne nur bulgarioj, sed ankaŭ multaj eksterlandanoj, amikoj de nia lando.

En la artgalerio „Sredec“ oni kolektas verkojn el la tuta mondo — bildojn kaj artobjektojn el Eŭropo, Azio, Ameriko, Afriko, kiuj prezentas diversajn kulturojn kaj tempojn. Preskaŭ ĉiuj eksponaĵoj estis transdonitaj al la Internacia Fonduso „Ljudmila Jivkova“.

Nuntempe en Bulgario oni faras donacojn ne nur en la sfero de kulturo, sed ankaŭ en diversaj aliaj sferoj. La kirurgo profesoro Aleksandăr Ĉirkov, kiu unua en Bulgario

faris transplantadon de koro, inaŭguris antaŭ du jaroj fonduson la „Koro“. Ĉiujn rimedojn kolektatajn en tiu fonduso, oni elspezados por disvolviĝo de la kirurgio. Lastatempe enkadre de la organizo „13 jarcentojn Bulgario“ estas kreita fonduso „Manoj“ por disvolviĝo de la kirurgio.

Malfacile estas rakonti pri la multnombraj iniciatoj kaj aktoj de donacemo. Unuopaj civitanoj, ofte kun modestaj eblecoj, donacas monon kaj valorajn objektojn. En la nomo de famaj bulgaraj scienculoj estas fonditaj stipendioj por la plej bonaj studentoj. La rimedojn por la stipendioj disponigas parencoj de la forpasintaj scienculoj.

Laŭ ideo de la plej populara televida elsendo „Ĉiun dimanĉon“ oni kolektas rimedojn en la fonduso „Soldatj monumentoj“ por eternigi la memoron de pereintaj soldatoj. Ja nur dum la periodo de sia nova historio (1878—1944), malgranda Bulgario travivis kvin militojn (inkluzive la du mondmilitojn), dum kiuj pereis multaj karaj filoj de nia popolo.

Tiel en nuntempa Bulgario renaskiĝas la donacemo. Ni havas bonan proverbon: „Jetu ion sur la vojon, ĝi estos trovita“.

Atanas ILKOV

Riĉa societa biblioteko

La donacemo inter sumenaj esperantistoj estas malnova tradicio. Por konservo kaj por utiligo fare de la novaj generacioj esperantistaj, famaj esperantistoj el nia urbo donacis kaj heredigis librojn kaj periodaĵojn esperantlingvajn. La donacojn aŭ heredaĵojn ili disponigis al Esperanto-societo „Vekiĝo“ — Ŝumen.

La societa estraro zorgas pri la bona konservado de tiu riĉaĵo. Ĝis antaŭ nelonge, pro manko de konvena klubejo, la libroj kaj periodaĵoj estis en privataj domoj. Sed ĉi-jare ni jam havas bonegan klubejon, kaj nun la ŝumenaj esperantistoj posedas bibliotekon kun pli ol 200 volumoj.

La pliparto de la biblioteka fonduso konsistas el donacoj kaj heredaĵoj de famaj esperantistoj: Ilija Silvestriev — fondinto de nia E-societo kaj multjara prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, Kiril Bogutinski — fervora esperantisto, aŭtoro de „Historio de la ŝumena E-movado“ (pli ol

100 maŝinskribitaj paĝoj). Li heredigis pli ol 300 volumojn (parto de ili poste estis transdonita al la Nacia E-Muzeo en Sofio). Canko Karaspasov heredigis sian E-bibliotekon kune kun la biblioteka ŝranko.

Pasintjare Ivan Smokov — honora membro de la ŝumena E-societo „Vekiĝo“ same donacis librojn kaj periodaĵojn. Antaŭ nelonge la ŝumena advokato Spiro Tanev donacis E-periodaĵojn, kiujn li heredis de sia frato, la fama ŝumena kuracisto kaj aktiva esperantisto d-ro Nikolaj Tanev — jam forpasinta. Temas pri jarkolektoj de „Bulgara Esperantisto“, „Esperanto“ de UEA, „Heroldo de Esperanto“, „Hungara Vivo“ k. a.

Multe da aliaj esperantistoj ankaŭ preparas siajn donacojn por pliriĉigo de la societa biblioteko, kiu nun estas bone ordigita kaj estas je la dispono de ĉiuj legemaj samideanoj.

Hristo TONEV

D-rino Soja Zamenhof en GDR

Okaze de la jubilea jaro, diversaj anoj de la familio Zamenhof, posteuloj de la iniciatin-to de Esperanto, partoprenis la 72-an Universalan Kongreson de Esperanto 1987 en Varsovio. Al ili bedaŭrinde ne apartenis familiano el Moskvo. Pro tio GDR tre ĝojis, ke la nepino de la kuzo de Ludoviko Zamenhof, d-rino Soja Zamenhof el Moskvo, vizitis nian landon, GDR, kaj havis almenaŭ postjubilean renkontiĝon kun la verko de ŝia fama praulo. Laŭ invito de GDREA ŝi partoprenis la Internacian Foiran Esperantistan Renkontiĝon (IFER'88) en Leipzig kaj konatiĝis kun esperantistoj en Berlin kaj Potsdam.

La red.

Kelkfoje ŝi jam vizitis Berlin, sed nur nun la esperantistoj ĉi tie atentiĝis pri la sovetia sciencistino kun tiu ĉi konata kaj ŝatata nomo. Mi kontaktiĝis kun doktorino Soja Zamenhof (aŭ ruse Samengof) la 7-an de marto 1988 kaj sciigis dum promenado en la urbo kaj interparolado ĉe kafotablo pri ŝia vivvojo.

Naskita la 2-an de junio 1924 en Moskvo kiel nepino de kuzo de la fondinto de Esperanto ŝi ankoraŭ rememoras pri la avo Fabian, kiu en Tula havis apotekon. La dokumenton pri la honora civitaneco de la avo en Tula ŝi posedis, sed intertempe ĝi perdiĝis. Kiel infano en la familio Soja aŭdis pri du famaj parencoj. La patro Miĥail Zamenhof (1890—1940) rakontis al ŝi pri la mondfama Lazar Ludvik Zamenhof, kun kiu li iam korespondis. Tiel ŝi ankaŭ aŭdis pri Esperanto. La patrino Jelisaveta Miĥajlowa (1889—1977) emocie rakontis pri sia onklo, la fama revoluciulo kaj sekretario de la Moskva Komitato de KPR (B), V. M. - Sagorski. Soja vizitis la lernejon de 1931 ĝis 1942. Dum la Dua Mondmilito post mallongedaŭra laboro kiel pionirgvidistino en lernejo kaj estrino en pionirkabineto de pionira domo en oktobro 1943 ŝi komencis studon en la Jura Fakultato de la Moskva Universitato. En tiu ĉi universitato 64 jarojn antaŭe ŝia fama parenco komencis medicinan studon, kiun li daŭrigis en la universitato de Varsovio. La nepino de lia kuzo en 1948 finis la universitatan studon kiel diplomita juristo. Post 11-jara laboro ĉe

ekonomia juĝejo ŝi estis akceptita kiel aspirantino en la instituto pri ŝtato kaj juro de la Akademio de Sciencoj de USSR. En 1963 ŝi estiĝis kandidatino kaj en 1984 doktorino de la juraj sciencoj. 125 publikaĵoj estas elokventa rezulto de ŝia scienca laboro sur la tereno de la ekonomia juro. Ĉu restas tempo por Esperanto?

Ŝi flue parolas la germanan lingvon, kiun ŝi lernis en 1975 prepare al la unua vizito en Berlin pro profesiaj kaŭzoj. Kunlabore kun GDR-juristoj ŝi publikigas ekonomijurajn verkojn. De tempo al tempo ŝi klariĝas, ke en 1958 ŝi kontaktiĝis kun sovetaj esperantistoj kaj partoprenis kurson de Esperanto. Unu kaj duonan jaron ŝi membriĝis en Esperanto-klubo en la Domo de la Medicino de Moskvo. Rerimarkita de Boris Kolker ŝi nun estas membro de la Moskva klubo „Scio“ en la fabriko „Kaŭĉuk“. Ŝiaj eldiroj malkaŝas ĝojon pri la sukcesoj de paco kaj interkompreniĝo de la popoloj. Kun granda intereso ŝi akceptis miajn informojn pri la nuntempaj klopodoj science esplori la vivon kaj verkon de Zamenhof kaj prezenti modernan bildon pri lia personeco. Konscie pri sia signifoplena nomo la tre okupita juristino, kiu ankoraŭ ĉijare finskribos 2 pluajn librojn, intencas plue subteni la agadon de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj.

Fritz-J. WOLLENBERG
(El „Der Esperantist“ — n-ro 2/1988)



Senakuzativaj instruantoj

Kion fari post la elementa kurso?

Nove bakitaj esperantistoj kutime suferas pro du obsedoj. Tuj post alproprigo de la rudimentoj de la lingvo, ili sentas, ke ili estas kompetentaj (1) verki poezion en Esperanto kaj (2) instrui la lingvon al aliaj. La unua okupiĝo apenaŭ estas riproĉinda, ĉar ĝi ne rekte malutilas al la aliaj homoj en Esperantujo. Se la poemoj havas beletrajn valorojn, amantoj de la literaturo legas kaj ĝuas ilin; male, se la versoj estas malaltkvalitaj, oni ignoras ilin kaj la nepublikigeblaj manuskriptoj flaviĝos en la tirkesto de aŭtoroj kaj redaktistoj.

La situacio rilate la instruadon de Esperanto fare de homoj, kiuj nur hieraŭ legis la lastan lecionon de la lernolibro, estas tute alia. Estas ĝenerale konsentite, ke ĉie en la Esperanto-komunumo troviĝas tro da entuziasmaj, sed nekompetentaj instruantoj. Tiu konstato estas emfazita ankaŭ sur la paĝoj de **Informilo pri la Instrua Laboro**, bulteno dediĉita al la metodiko de Esperanto-instruado. Sur pĝ. 9 de la numero de aprilo 1987 aperas jena frazo graveda je signifo:

„La Plenkunsido (de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio) konstatis, ke la ĝisnunaj rezultoj (de kursoj kaj kunsidoj por preparo de instruistoj de Esperanto) ne kontentigas. Malalta estas la prepariteco de la plejmulto de la kursgvidantoj.”

Analizo de la lingvouzo en artikoloj verkitaj de instruantoj kaj publikigitaj en **Informilo** pravigas la konstaton de la Plenkunsido en la ĉi-supra citaĵo. En tiu ĉi artikolo mi pritraktos per la helpo de ilustraj frazoj ĉerpitaj el **Informilo** unu el la plej gravaj kaj oftaj mankoj en la prepariteco de kursgvidantoj: la ĝusta uzo de la akuzativa kazo en Esperanto.

Spuroj de mankantaj akuzativoj

Atenta tralegado de **Informilo** montras, ke eraro, kiu estas tre ofte ĝustigita per pluma aldonaĵo al la tajpita teksto, estas manko de la litero „n”. Se temus nur pri korektado de tajperaroj, kial ne troviĝas ankaŭ aliaj specoj, ekzemple manko de la „j” de pluraloj aŭ la „e” de adverboj? Ke temas ĉiam pri manko de la akuzativa „n” estas nerefutebla pruvo, ke tiu gramatikaĵo ankoraŭ ne estis plene alproprigita fare de la verkintoj de la artikoloj, kaj eble ankaŭ de la tajpintoj kaj la kompostintoj. Ne nur **Informilo** pekas ĉi-rilate; similaj plume skribitaj „n”-literoj makulas tekstojn en la cirkuleroj de la Akademio de Esperanto. En tiuj dokumentoj aperas ankaŭ variaĵo de la korektado. La mankanta „n” estas „sandviĉe” tajpita en la spaco inter du vortoj. Ĉu temas pri instruantoj-kontribuantoj al **Informilo**, ĉu temas pri la prezidanto de la Akademio, la kaŭzo de la akuzativaj eraroj estas la sama: ankoraŭ ne plena primajstrado de la uzo de la akuzativa kazo en Esperanto.

Kvin frazoj kun deko da mankantaj akuzativoj

La sekvaj frazoj el la plumo de instruantoj de Esperanto, venas el diversaj numeroj de **Informilo pri la Instrua Laboro**.

1. „Post la fino de ĉiu leciono ni legadis (preskaŭ kiel „romano”) la koncernan gramatikon sur la lastaj paĝoj de la libro”.

Kion ni legis? La gramatikon. Kiel ni legis ĝin? Preskaŭ kiel ni legas romanon. La substantivo „romano”, kiel objekto de la subkomprenata verbo „legas”, devas esti

Foto de la numero: La kolektivo de „Bulgara Esperantisto” — ĉiuj nefumantoj, partoprenas la popularan televidan elsendon „Bonan matenon!” dediĉitan al la homoj kiuj deziras forlasi la fumadon.

Foto: Kirilka SAVOVA

en la akuzativa kazo. La krampoj havas ne-
niun efikon sur la gramatikon!

2. „La praktiko montras, ke ordinaraĵ
trejnadludoj (ekzercaĵ ludoj) devas
daŭri de 2 ĝis 5 minutoj, kaj la ludo-
konkursoj de 8 ĝis 10 minutoj”.

En tiu ĉi frazo temas pri esprimo de tem-
podaŭro. En adjektoj de daŭro la akuzativo
anstatuas prepozicion. Kiom longe devas
daŭri la ludoj? Jen 2 minutojn, jen 3, 4 aŭ
5 minutojn. Ili daŭras de 2 ĝis 5 minutojn.
La prepozicioj „de” kaj „ĝis” rilatas nur al
la numeraloj, ne al la sekva substantivo, in-
dikanta daŭron. Komparu jenan zamenho-
fan frazon: „Ili povis kuŝi ok ĝis naŭ jarojn”.

3. „Dum la instruado kaj dum la vespera
okupo, la tri instruistoj klopodis apliki
diversajn aŭdvidajn instruhelpilojn,
ekz. kasetofono, gramofono, diversaj
mezgrandaj kaj grandformataj bildoj,
pluraj bildkartoj, desegnaĵoj...”

La adverba vortformo „ekzemple” ne efi-
kas sur la kazon de la sekvaj substantivoj.
Laŭ la konstruo de la frazo, ili devas akordi
kaze kun „diversajn aŭdvidajn instruhel-
pilojn”, kiu estas objekto de la verbo „apliki”.
Oni, do, skribu: „ekz. kasetofonon, gramo-
fon, diversajn mezgrandajn kaj grandfor-
matajn bildojn, plurajn bildkartojn, de-
segnaĵojn...” Komparu la sekvan frazon de
Zamenhof: „Oni povas proponi internaciajn
sistemojn por la oportuneco de la rilatoj in-
ternaciaj, kiel ekzemple internacian mon-
sistemon, horsistemon, kalendaron ktp”.
Tiu ĉi gramatikaĵo nomiĝas la **elnombra-**

do, kaj estas aparta kazo de la **ekvivalen-
to (Plena Analiza Gramatiko, § 131).**

4. „.... mi ĉiam proponis konvenajn adre-
sojn de alilandaj lernantoj — samaĝu-
loj, prenitaj de Informilo kaj de „BE”.”

Al kiu substantivo rilatas „prenitaj”? Ĉu
la „lernantoj-samaĝuloj estis prenitaj de In-
formilo? Tio estas sensencaĵo! Tamen pri
„konvenajn adresojn”. Sekve de tio, la par-
ticipo devas akordi kaze: „prenitajn”.

5. „.... antaŭ kelkaj monatoj li intervjuis
la elstaran jugoslavan sugestologon
Vidak Jukiĉ utiliganta sugestologiajn
metodojn por sanigaj celoj”.

Kiujn vortojn kvalifikas „utiliganta”? „....
elstaran jugoslavan sugestologon”. Sekve,
devas esti kaza akordo: „utiligantan”.

Grava kaj urĝa tasko por metodologoj

Mi proponas, ke metodologoj, kiuj teoriu-
mas pri lingvoinstruadaj aferoj, serĉu prak-
tikan manieron enkapigi al instruantoj de
Esperanto la ĝustan uzon de la akuzativa
kazo en Esperanto. Kiu ne kapablas ellerni
tiun gramatikaĵon, estu deadmonita de
instruado. Tiuj homoj ricevu nek atestilon,
nek diplomon, nek titolon de „elstara lekto-
ro” aŭ „rekonita lektoro”. Aŭtoritataj eduk-
instancoj en Esperantujo devas esti ekste-
ordinare severaj; nur tiel estos eble plialtigi
la preparecon de kursgvidantoj.

Bernard GOLDEN

Temo de la numero

Karaj legantoj!

Temo de nia numero 5/89 estos „Mi kaj mia E-societo”.
Do, skribu al ni pri aktualaj problemoj kaj pri sukcesoj de
via societo, pri via kontribuo al ĝia estonta evoluo. La plej
interesaj leteroj estos publikigitaj.

Ni atendas viajn opiniojn kaj proponojn ĝis la fino de
marto 1989.


La Redakcio

Mi serĉas amikojn...

Karaj kaj estimataj redaktoroj,

Dank'al mia leteramikino Sonja Senj el Veliko Târnovo, mi povas regule legi ĉiun numeron de „Bulgara Esperantisto”. Tiu ĉi revuo ja estas la plej elstara kaj leginda el la monda E-gazetaro, ĉar ĝi estas bonstile verkata kaj facile komprenebla, altvalita kaj enhavoriĉa. Dum mia studo de la bulgara E-movado, ĝi tiel multe impresis min, ke mi ofte informadas ĉinlingve pri ĝi al „La Mondo” — la organo de ĈEL, kaj al aliaj kelkaj lokaj E-gazetoj. Jam en mia E-libraro troviĝas ne malmultaj novaj kaj malnovaj libroj kaj gazetoj pri Bulgario.

Mi petas vin anonci mian korespondpeton: 30-jaraĝa esperantisto, kiu studas la evoluon de E-movado, ĝian historion, deziras korespondi mondscale, interŝanĝi librojn, gazetojn en kaj pri Esperanto kaj



aliajn esperantaĵojn novajn kaj malnovajn. Mia nomo kaj adreso: Jiĉi-

no, 56.508 Lihe Xincun, Suzhou 215006, Ĉinio.

PREMIO POR BULGARINO

La bulgara esperantistino inĝ. Maria Taŝeva gajnis unuan premion en la internacia konkurso de gazeto „Kurier Podlaski” en Bjalistoko pri temo: „Kio estas por mi Esperanto?”

La konkurso estis anoncita pasintjare kaj la rezultojn publikigis speciala eldonaĵo de tiu gazeto dum la 73-a Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam — julio 1988.

Ĉi-sube ni publikigas eltiraĵojn el la premiita eseo.

„BE”

Nun, kiam mi direktas mian rigardon al la trairita vojo, mi povas konfesi, ke mi benas la tagon, en kiu mi eksciis pri Esperanto. Tio okazis en 1941. Tiam mi estis membro de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS). Iu rekomendis al mi Esperanton. Mi eklernis ĝin kaj por ĉiam ligis mian sorton kun la Internacia Lingvo. Sed tiutempe mi ne povis perfektigi ĝin, ĉar mi vivis en malriĉeco. Krome, dum la Dua Mondmilito mi partoprenis la batalon kontraŭ la faŝismo en urbo Plovdiv.

Post la Dua Mondmilito mi denove komencis okupiĝi pri Esperanto. Mi ĉiam klopodas plivastigi kaj pliprofundi miajn lingvokonojn. Mi aktivas en la vivoj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj de virina esperanta movado.

Ripozante en urbo Varna, mi persone kolektis 198 subskribojn por paco kaj malarmado de bulgaroj el diversaj urboj. Mi organizis renkontiĝon de virinoj el la urbo. Tiam mi parolis pri la virina esperanta agado kaj MEM. La ĉeestintoj ege ekinteresiĝis pri Esperanto.

La E-propagando en neesperantaj organizoj estas tasko de nia movado. Ankaŭ mi klopodas helpi al samideanoj en Afriko, sendante al ili E-revuojn, -librojn, -leterojn k. a.

Mi opinias, ke interkompreniĝo kaj pacbatalo de la popoloj estas la plej gravaj taskoj kaj celoj de la E-movado. La grava porpaca kaj interamikiga rolo de Esperanto estas evidenta kaj necesa. Tiucele mi ankaŭ kontribuos, ĉar Esperanto kiel kultura fenomeno estas neimagebla sen paco. Esperanto havigas al mi malgrandajn kaj grandajn ĝojojn kaj feliĉon. Por mi ĝi estas ĉiam malfermita fenestro al la mondo. Ekde 1978 mi partoprenis ĉiujn Universalajn E-Kongresojn. Mi korespondas kun pli ol 100 geesperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Ofte mi sendas al ili bildkartojn, E-librojn, afiŝojn, revuojn, artaĵojn, pupojn en naciaj kostumoj, diversajn memoraĵojn ktp.

Mi multe vojaĝas eksterlande por partopreni E-kongresojn, renkontiĝojn, kursojn aŭ simple por gastigi al miaj korespondamikoj kaj konatiĝi kun iliaj landoj kaj popoloj. Volonte mi heblas eksterlandajn samideanojn, se ili bezonas tranokti aŭ ekskursi al urbaj vidindaĵoj.

Dum multaj jaroj de mia E-aktivado mi komprenis klare kaj profunde la seriozecon de la problemoj pri internacia lingvo, ties historio kaj socia bazon. Esperanto aperis antaŭ mi ne kiel hazarda ideo de unu sola persono, sed kiel natura solvo de grava socia problemoj. Ĝi estis kreita de historiaj cirkonstancoj. La senĉesa plimultiĝo de komunikoj inter la popoloj neeviteble trudis la neceson serĉi naturan kaj racian lingvan rimedon por forigi la barojn sur la vojo de homa progreso.

Inĝ. Maria TAŠEVA

Gaste ĉe Elisaveta Bagrjana



Elisaveta Bagrjana estas unu el la plej talentaj bulgaraj poetinoj. Ŝi naskiĝis la 16-an de aprilo 1893 en Sofio kaj ĉi-jare oni festis ŝian 95-jaran jubileon. Okaze de tiu ĉi jubileo Bulgara Esperantista Asocio eldonis en Esperanto la poemaron „De bordo al bordo”, kiu enhavas la plej belajn poemojn de Bagrjana, verkitajn dum pli ol sepdek jaroj. La poemoj estas tradukitaj de la konataj bulgaraj tradukistoj Asen Grigorov, Ĥristo Gorov, Canko Murgin, Venelin Mitev, Nikola Uzunov kaj Nikola Pilev.

Tuj post la apero de la poemaro, la poetinon vizitis Venelin Mitev — kunmetinto de la poemaro, Georgi Miĥalkov — redaktoro kaj Ljubomir Trifonĉovski, kiuj transdonis al ŝi ekzemplerojn de la nova libro kaj bondeziris al ŝi sanon kaj novajn sukcesojn. Elisaveta Bagrjana tre kore akceptis la gastojn. Dum la kortuŝa renkontiĝo ŝi rakontis pri sia vivo kaj respondis al la demandoj de la gastoj.

— *Sinjorino Bagrjana, Viaj poemoj estas tradukitaj en pli ol 25 lingvojn, sed la unua traduko de Via poemo estas en Esperanto. Via opinio pri tiu ĉi lingvo?*

— Mi ege ŝatas Esperanton kaj eble malmultaj personoj scias, ke kiam mi studis slavan filologion en la Sofia Universitato, dum iom da tempo mi lernis Esperanton, sed bedaŭrinde mi ne povis fini la kurson, ĉar mi devis ne nur studi, sed helpi al miaj gepatroj. Mi devenas de multnombra familio kaj mi, la plej aĝa filino, devis zorgi pri miaj pli junaj fratoj kaj fratinoj.

— *Kiel Vi iĝis poetino?*

— Post la fino de la Universitato mi estis instruistino en urboj Vraca kaj Kjustendil. Tie mi ne nur instruis literaturon, sed kun la lernantoj mi surscenigis teatraĵojn kaj tiel mi deziris veki en ili amon al la poezio, al la literaturo. Poemojn mi verkis jam en la infanaĝo, sed en 1927 aperis mia unua poemaro „Eternulino kaj sanktulino”, kiu iĝis evento en la bulgara literaturo. Post ĝia apero mi entute dediĉis min al la poezio kaj ĝis nun la poezio konstante akompanas min.

— *Vi estas ne nur poetino, sed unu el la plej talentaj bulgaraj tradukistinoj. Vi tradukas*

poemojn el rusa, franca kaj el aliaj lingvoj. Ĉu por Vi la tradukado estas iaspeca ripozo, destino aŭ Via poetina devo?

— Kiel mi diris, mi ne povas vivi sen poezio. Mi bezonas ne nur krei poemojn, sed legi poemojn, kaj kiam la poemoj de fremdlingvaj poetoj emocias min, mi deziras tuj traduki ilin bulgaren. Tiel aperis miaj poemtradukoj de Anna Aĥmatova, Marina Cvetaeva kaj de multaj aliaj poetinoj kaj poetoj, kiujn mi sentis proksimaj al mia poezia naturo, al mia animo.

— *Viaj poemoj, tradukitaj en plurajn lingvojn, estas konataj en diversaj landoj. Kiel Vi rilatas al tio?*

— Mi tre ĝojas, ke per miaj poemoj mi trovis vojojn al diversaj homoj. Konstante mi ricevas leterojn el foraj landoj. Skribas al mi nekonataj personoj, kiuj esprimas siajn sincerajn sentojn, sed neniam mi forgesos la jarojn dum la Dua Mondmili-

to, kiam mi ricevis sennombrajn leterojn de la fronto, en kiuj nekonataj bulgaraj soldatoj skribis al mi, ke en la tranĉeoj ili legis miajn poemojn, kie ili trovis ilin mane transskribitaj sur kajerfolioj.

— *Krom la poezio, kion Vi pleje ŝatas?*

— Vojaĝi, vidi novajn mondojn, konatiĝi kun multaj interesaj homoj. Ege trafe Vi titolis la Esperantan poemkolekton „De bordo al bordo”, cetere unu el miaj bulgarlingvaj poemaroj same havas titolon „De bordo al bordo”.

— *Nun, pere de Esperanto, Viaj poemoj same flugos de bordo al bordo, de kontinento al kontinento kaj dank’ al Esperanto multaj legantoj ekkonos Vin kaj Vian valoran poezion.*

— Mi dankas kaj mi petas Vin, bonvolu voĉlegi unu el la poemoj tradukitaj en Esperanton, por ke mi aŭdu kiel ĝi sonas en la Lingvo Internacia.

Mi tralegis la poemon „Mia kanto”, kiun tradukis Venelin Mitev. Post la traŭgo de la poemo ŝi esprimis sian admiron kaj kontenton pro la melodias kaj belsona traduko.

Intervjuis: Georgi MIĤALKOV

ETERNULINO

*Ŝi kuŝas nun sensanga kaj senkarna preskaŭ,
senmova kaj senspira kaj senscia.
L' okuloj kaviĝintaj kaj fermitaj restas,
kaj tutegale ĉu ŝi estas Anna aŭ Maria,
kaj tutegale — ĉu vi ploros aŭ petegos,
palpebrojn delikatajn ŝi ne levos,
kaj ne moviĝos lipoj premiĝintaj
la spiron kaj la ĝemon lastajn ellasintaj.
Kaj vidu: larĝa, fremda staras jam la ringo
sur la eterne krucmetita fingro.*



*Sed ĉu vi aŭdas la senkulpan krion
de infaneto en lulil' apuda?
Jen — ŝia sang' senmorta pasis tien,
kaj tie restis la animo tuta...
Forpasos tagoj, jaroj kaj centjaroj,
kaj lipoj de enamiĝintaj paroj
denove flustros „Anna” aŭ „Maria”
en la aromoj de l' vesper' junia.
Kaj ĉion portos la nepin' aminda:
okulojn, lipojn, nomon — de la forpasinta.*

INTÉRIEUR

*Vi parolas sindone kaj varme,
vi rigardas min ame, tenere,
mi aŭskultas spiritoforeste.
Hurlas neĝa blovado ekstere.*


*El la floroj apude pendantaj
venas stranga, tenera aromo
kaj flustradas, ke ilin hieraŭ
vi alportis al mi en la domo.*

*Vi ja estas sindona, fidela,
tute mia konstante, por ĉiam —
kaj pardonu la ridon intencan,
mian ruzon virinan kelkiam.*

*Ĉar mi amas, samkiel vi amas —
malespere, ĝismorte sopire,
kaj mi ofte, sed vane decidas
al la sekva renkonto ne iri.*

*Sed aŭdinte, ke vi al mi venas,
mi subite, abrupte vekite
tra alia irejo forkuras,
min kaŝante de vi, konfuzite.*

*Kaj mi iras al vi obeeme,
kvazaŭ kaptus min forto magia,
kaj revenas humila kaj laca,
disbatita kaj kulpokonscia.*



Unua renkontiĝo en GDR

Tiu aranĝo de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR ŝajnas esti efektive tre grava, se pri ĝi en la redakcion venis ne unu aŭ du, sed tutaj tri informoj!

Ĉar ĉiu el ili estas valora per si mem, ni decidis uzi ĉiujn tri, por pli plene, kaj eble eĉ pli interese, prezenti la eventon.

La aŭtoroj ne estu ŝokitaj — ni ne fuŝis iliajn informojn — simple ni ellasis ripetigantajn tekstopecojn.

„BE“

Vi ne estis en Bizental?

Do vi perdis! Ĉar tie, de la 3-a ĝis la 6-a de oktobro 1988 okazis la 1-a Centra Junulara Renkontiĝo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, kun 200 gejunuloj, inter ili gastoj el Bulgaio, ĈSSR, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio. Pli ol 20 prelegoj, diskuttrondoj, seminarioj pri diversaj temoj, i. a. pri TEJO, sciencteknika apliko de Esperanto, DLT, instruado, informado, ekologio, sociologio, esperantologio, ra-

dioamatorismo, pri junulara agado de GDREA kaj internacie ktp.

3 dancvesperoj, ekskurso al la fama Ŝipleatorio Niederfinow, oratoria konkurso, internacia kultura vespero, 90-minuta muzikprogramo per komputilaj sintezigiloj, danciga ĵazkoncerto kaj multo alia.

Kie troviĝas tiu Bizental (Biesenthal)? Nu, norde de Berlin. La renkontiĝo klare montras: la junaj esperantistoj de GDR ekmoviĝas.

D-ro Detlev BLANKE

Post longdaŭra kaj serioza preparo la Unua Centra Renkontiĝo de Junaj Esperantistoj de GDR en la Centra Pionirtendaro „Helmut Just“ apud la urbeto Biesenthal norde de la ĉefurbo de GDR Berlin, povis okazi. Jam antaŭe multajn distrik-tajn kaj regionajn renkontiĝojn por-junularajn oni aranĝis en GDR, sed nenio tutrespublika. Pro tio la evento estas vere tre grava.

Ĉiuj partoprenintoj havis eblecon informi dum prelegoj, diskutoj kaj seminarioj pri la evoluo de la Esperanto-movado kaj ĝiaj perspektivoj nacie kaj internaice, same tiel pri la engaĝo de junaj esperantistoj por paco kaj progreso kaj kiun rolon la Libera Germana Junularo (junularorganizo de GDR) ludas dum tio? Sed ankaŭ pri instruaj metodoj ĉu pere de homo aŭ maŝino kaj pri programoj por lingva traduko pere

de komputero (DLT) kaj pri la rilatoj de la internacia planlingvo al la laborista movado kaj al la medioprojektado.

En la ampleksa programo dum la kvar tagoj estis tempo ankaŭ por ekskurso al la ŝiplejatoro Niederfinow, (teknika memorejo en funkcio), por muziko per komputero, sed ankaŭ por internacia vespero. Dum la lasta aranĝo polaj knabinoj prezentis sin kun popolaj kaj Esperanto-kantoj, la gastoj el Latvio i. a. kun muziko sur origine latva instrumento, sed ankaŭ el nia respubliko (GDR) junaj esperantistoj bonege montris sian kapablon kanti kaj inter ili kulmino estis la prezentado de du sorabinoj en iliaj popolaj kostumoj tradiciaj. La soraboj estas la sola nacia minoritato en GDR. Ili estas okcident-slava popolo.

Kelkaj gazetoj raportis pri la sukcesa esperantista aranĝo, ankaŭ junular-elsendoj de la radio.

La junulara sekcio de GDREA intencas organizi post du jaroj denove alian Centran Renkontiĝon de Junaj Esperantistoj.

Siegfried WAGNER

Bele situanta objekto de la tutlanda junulara organizaĵo (FDJ) estis disponigita por la Renkontiĝo. La alveturantoj havis eblecon bone distriĝi: funkciis diskoteko, estis lanĉitaj malgrandaj ŝak- kaj Go-turniroj, eblis ludi pilkludojn kaj tablotenison.

La sekvontaj 2 tagoj estis ege impresoriĉaj. La freŝa mateno plialtigis la humoron per la ebleco ludi popgimnastikon, lerni kaj praktiki karate-ekzercojn aŭ arbarkuradon ĉirkaŭ la proksima lago.

La granda malferma aranĝo enhavis kelkajn prelegojn de GDR-aj E-aktivuloj kaj gastoj. Sekvis laboro en diversaj diskutrondoj, ĉiuj proponis interesan enhavon kaj estis vere granda malfacilaĵo elekti inter ili. Unu el la plej interesaj kaj riĉenhavaj estis la prelego sub titolo „GDREA — situacio, planoj, problemoj, evolutendencoj”.

Multnombraj estis la vizitantoj de la libroservo, kiu funkciis dum la paŭzoj kaj ofertis abundan literaturan stokon. Tre interesaj estis la diapozitivaj pri la JIK en Zagrebo, de-

monstritaj de kelkaj esperantistoj-partoprenintoj.

La renkontiĝo kun E-veteranoj-laboristoj proponis emocian rakonton pri malfacilaj momentoj en la E-movado inter la du mondmilitoj kaj pri la nunaj paŝoj de la esperantistoj en GDR post la Dua Mondmilito.

La antaŭlastan tagon ni vizitis la ŝiplejatoron en la proksima urbo Niederfinow (Niderfinov). La panoramo tie estas vere mirinda: per grandega levilo ŝipoj povas venki la altecdiferencon de 36 m inter la riveroj Oder kaj Havel, kiujn ligas la samnoma kanalo.

La junulara radiostacio DT-64 raportis pri la evento en sia programo la 6-an de oktobro, kaj la organizantoj preparis belan memoraĵon por la leteramikoj. Ili eldonis koverton kaj leterfolion kun speciala emblemo de la renkontiĝo.

La organizo de la Renkontiĝo estis altnivela kaj estas vere ĝojiga la fakto, ke multaj junaj esperantistoj el GDR aktive partoprenas la nacian E-movadon. Al ĉiuj ili — sukcesan estontan laboron!

Antoaneta NIKOLAEVA

ESPERANTISTA SPURO SUR ELBRUSO

Turista societo „Aleko” en Pazarĝik organizis ekspedicion ĝis Kaŭkazo, dediĉitan al la 44-a datreveno de la 9-septembra revolucio en Bulgario. En la ekspedicio partoprenis 9 alpistoj, inter kiuj ankaŭ la sekretariino de esperantista societo „Radio” en Pazarĝik Grozdenka Stojanova Filipova. La turista marŝo okazis de la 21-a de julio ĝis la 15-a de aŭgusto 1988.

La 5-an de aŭgusto je la 2-a horo matene la grupo komencis atakon de la montopinto, kaj je la 8,30 horo la frunta parto de la grupo surpaŝis okcidentan Elbruson (5642 m super la marnivelo).

Flanke de la sovetaj alpistoj grave helpis nian grupon la instrukciino Tatjana Ivanova, la direktoro de la turista bazo Dobrovol'skij k. a.

Do, niajn gratulojn al la brava esperantistino Grozdenka Filipova, kiu inde prezentis la turistan grupon de nia E-societo.

Petko ARNAUDOV,
Pazarĝik

JUBELEO EN GORNA ORJAĤOVICA

En decembro pasintjare la esperantistoj el Gorna Orjaĥovica festis la 80-jariĝon de la loka Esperantista organizaĵo.

Jam en la stacidoma atendejo oni povas vidi bele aranĝitan tabulon kun la nomoj, adresoj kaj telefonnumeroj de la komunuma E-estraro kaj de la estraro de Klubo de Fervojistoj-Esperantistoj. Tio certe faciligus samideanojn vizitantajn nian urbon.

Nia plej granda sukceso estas la manifestiĝoj de nia Esperanta ĥoro kun gvidanto Enĉo Balanov. Ĝi gastis en IEK-Pisaniĉa, Veliko Târnovo, Loveĉ kaj aliloke.

La internacia agado de la societo bone evoluas. Fervojistoj partoprenis la ĉi-jaran kongreson de IFEF en Perpignan (Francio). La E-instruistino Penka Bujuklieva vizitis Baltan Esperanto-Tendaron en Talino (21—31.VII.1988). En la klubejo estas tabulo, sur kiu estas aranĝitaj interesaj bildkartoj de niaj eksterlandaj korespondantoj. La intereso al tiu tabulo estas tre granda.

La loka radio-reto kaj la urba gazeto diskonigas la manifestiĝojn de nia societo.

Angel MĂGLOV



Distroj

Karaj ŝatantoj de nia distra paĝo,

Jen la solvoj de la enigmoj publikigitaj en n-ro 7—8/1988 de „Bulgara Esperantisto“.

Angulenigmo:

- A. Hispanio
- B. Islamon
- C. Slalom
- Ĉ. Palis
- D. Amos
- E. Nom
- F. In
- G. O

Proverbo: *Amiko fidela estas trezoro plej bela.*

Ĝis la difinita dato en la redakcio venis 29 respondoj. Unua skribis al ni Ĥristina Terzieva el Velingrad: „La distra paĝo en n-ro 7—8/1988 de „Bulgara Esperantisto“ tre plaĉas al mi. Ricevante la revuon, mi unue legas ĝin kaj poste — la aliajn artikolojn“. Siajn solvojn sendis ankaŭ s-no Antero Harlju el Finnlando, kiu skribas: „Miaopinie la distraj paĝoj estas necesaj inter la seriozaj faktikoloj kaj novaĵoj, precipe por komencantoj. Enigmoj povus esti diversgradaj laŭ malfacileco, eble, kelkaj povus esti

por infanoj, sed plenkreskuloj ŝatas pli seriozajn problemojn por cerbumado.“

Solvante niajn enigmojn sian intereson al ili montris Jones Malcolm el Britio, Salina Popieriene el Litovio, Vasil Georgiev kaj Ĥristo Tonev el Ŝumen, Cvetan Manojlov el Miĥajlovgrad.

Post lotumado d-ro Otto Kaczinski el GDR gajnis la premion — la bulgaran E-libron „Ruza Petro“. Niajn gratulojn! „BE“

Neutiligitaj eblecoj

Sendube, hodiaŭ la enigmoj triumfas sur la paĝoj de la periodaĵoj en ĉiuj landoj. Milionoj da homoj en la tuta mondo ĉiutage pasigas agrablajn minutojn, ravite de la magio enŝlosita inter la blankaj kaj nigraj kvadratoj.

La diversaj specoj de enigmoj — krucvortenigmoj, rebusoj, anagramoj k. a. donas grandan eblecon ne nur al la nacilingva gazetaro sed ankaŭ al la E-gazetaro. Tamen, malmultaj esperantlingvaj periodaĵoj publikigas enigmojn kaj ili ne povas satĝuigi la enigmoŝatantojn. Nun ni devas serioze kaj urĝe pritaksi la senduban utilon de la enigmoj, konsiderataj ĝis nun en

Esperantujo kiel neserioza afero. Ni scias, ke la ĉefa destino de la enigmoj estas livero de variaj informoj. Sed ĉu tio sufiĉas? En unu aŭ alia aspekto tiu amuza kaj ne nur amuza arto donas al ni eblecon kontroli niajn sciojn kaj la rapidecon de niaj reagoj. Kaj ne laste ĝi donas kontentecon pro la solvo.

Pro tiuj dignoj la enigmoj devas trovi konstantan lokon sur la paĝoj de la Esperanta gazetaro. Kaj ne nur tie. Ĝi povas trovi lokon ankaŭ en lernolibroj kaj esti bona helpilo al lernantoj.

Se oni serioze pritaksos la utilon de la enigmoj, la rezultoj ne malfruigos.

Cvetan MANOJLOV


MAGIA ENIGMO


Horizontale kaj vertikale:

1. Orientafrika lando
2. Fortega, nenormala konstanta inklino al io, stranga aŭ ridinda kutimo.
3. Longa kaj vasta senmanika supervesto.
4. Anatomia organo en la maldekstra parto de la ventra kaveto.
5. Sciencisto pri kemiaj fenomenoj de la vivo, kaj la kemia strukturo de la vivuloj.

Cvetan MANOJLOV

Noto de la Redakcio: Ni atendas viajn solvojn ĝis la fino de februaro. La gajnonto estos anoncita en n-ro 5/1989 de „Bulgara Esperantisto“.





KAPRIKORNO

(21.12—20.01)

*Tiu signo fortas kaj stabilas —
ĉiam per la idear' flugilas!
Ŝajne ĉiuj scienculoj tie
suferigas la sciencon „pie“...*

*Ili estas uniktoleremaj,
akurataj, spertaj kaj ŝparemaj.
Do, la „puran ludon“ nur akceptas,
kaj insiste al la ver' adeptas!*

*Iuj signon tiun ĉi neglektas,
plenneceson ja pri ĝi elektas:
trinkas kaj en la barar' anhelas,
hm... ĝis ilin oni piedbatforpelas...
Inojn amoremas, singardemas.
Eĉ se ili vin freneze amas,
pro fiero tion ne deklamas!*

*Tie inoj havas fortan volon —
plenumadas ĉian viran rolon.
Ŝulde al neniun ekadaptas.
Pro kompleksoj ŝancon, ve, malkaptas...*

*Ilin trafas la fortun' malfrue —
kiam la nepet' ekpaŝas flue.
Sed la Kankroj ilin senmonigas —
se vi fortas — vivon vi instigas!*

El la bulgara: Asen JOSIFOV



Tra la mondo

BRAZILLO. La grandan ekspozicion pri temo: „Esperanto: 100-jara kulturo“, okazinta en Kuriĉibo (Suda Brazilo) de januaro ĝis aprilo pasintjare, vizitis pli ol 22 000 personoj. La aranĝo estis malfermita de la ŝtata sekretario pri kulturaj aferoj, la prezentantino de Parana Esperanto-Asocio E. Feitosa, kaj de akad. G. Mattos. La lokaj gazetaro kaj televid-stacioj vaste raportis pri la ekspozicio.

GDR. La renoma leipziga hotelo „Merkur“ uzis Esperanton: sur la higienaj saketoj, kiujn ĉiuj gastoj ricevas, estas kvarlingvaj klarigoj, interalie en Esperanto.

POLLANDO. Marŝalo Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento kaj Honora Protektanto de la 72-a Jubilea UK en Varsovio, dum sia ŝtata vizito al Aŭstrio (en decembro 1987) malgraŭ sia streĉita programo (renkontiĝo kun la ĉefkanceliero kaj prezidanto de Respubliko Aŭstrio), trovis tempon por viziti la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, kies kulturen laboron li alte taksas.

SVEDIO. Unu el la plej aĝaj daŭre aperantaj Esperanto-Revuoj — la sveda „La Espero“ festis en 1988 75 jarojn da aperado.

USONO. La usona lingvo-instruisto Dennis Keefe (Unuversitato de Illinois), post sesjara esplorado ellaboris kompletan metodon kurson de Esperanto, kiu evoluigas la tradician Cseh-metodon kaj similigas la instruadon de Esperanto al tiu de naciaj lingvoj.


Dennis Keefe prezentis sian Bazan Kurson en kadre de la Pedagogia Kurso okazinta en aprilo 1988 en Gresillon (Francio). Novaj pedagogiaj seminarioj lige kun la ĉi-supre menciita instru-metodo verŝajne okazos en Gresillon printempe de 1989.

DIVERSAJ:

● Laŭ pritakso de multaj homoj la gazeto „Moskvaj Novaĵoj“ nun estas la plej interesa periodaĵo de USSR. Nun ĝi aperas en 5 lingvoj, baldaŭ aldoniĝos 3 novaj, kaj la redakcio nun sondas la grundon eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto. Helpu al la redakcio realigi tiun iniciaton! Favore al la esperanta versio de la gazeto skribu al Egor Jakovlev, ĉefredaktoro de „Moskovskije Novosti“ (Moskvaj Novaĵoj), Moskvo, 16/1 ul. Gorko, Sovetunio.

● La 2-a internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazis inter la 10-a kaj la 16-a de aŭgusto j. k. en Pekino. Pli ol 1 000 fakuloj sin anoncis por partopreni la Konferencon. Multaj el ili detale aŭ resume verkis prelegon pri siaj rezultoj kaj spertoj en scienc-esplorado dum la lastaj jaroj. Multaj raportoj venis de konataj sciencistoj kaj superaj inĝenieroj subtenantaj Esperanton en la scienc-teknika kampo — ĉinaj kaj alilandaj.

● Afrikaj literaturoj kaj Esperanto. En la kadro de ekspozicio pri afrikaj literaturoj, okazinta en majo 1988 en la biblioteko de Lugano (Svislando), estis prezentitaj ankaŭ kvar Esperantaj libroj pri la suahila lingvo, nome: — Esperanto: Jifunze lugha ya kiesperanto (N. Vessella); — Vortaro de Esperanto kaj svahila (J. Knappert); — Skizo de suahila metriko (N. Vessella); — Salale! (F. Topan, E. Husein).



Deziras korespondi

BULGARIO

DONKA NIKOLOVA (37-jara) — 7400 Isperiŝ, Razgradska obl., ul. Rosica 51 — kun ĉi pri ĉt.

IVAN NIKOLOV (43-jara) — 7400 Isperiŝ, Razgradska obl., ul. Rosica 51 — kun ĉi pri ĉt.

GENKA NEDKOVA (57-jara) — 7400 Isperiŝ, Razgradska obl., ul. Georgi Benkovski 12 — kun ĉi pri ĉt.

RADKA STEFANOVA (33-jara) — 7400 Isperiŝ, Razgradska obl., ul. Stara Planina 14 — kun ĉi pri ĉt.

ĤRISKA STOIMENOVA (50-jara) — 7400 Isperiŝ, Razgradska obl., ul. Vasil Kolarov 21 — kun ĉi pri ĉt.

SNEJINA KOLEVA (13-jara) — 4230 Aŝenŝovgrad, ul. Georgi Dimitrov 111, et. 8, ap. 26 — kun ĉi pri muziko, naturo, sporto, kino. Kolektas kalendarojn.

SVETLA VELIZAROVA (lernantino) — 8600 Jambol, ul. Graf Ignatiev bl. 74, vh. 5, ap. 44 — kun ĉi pri ĉt.

GALJA IKALOVSKA kaj GALJA KOLOVSKA (12-jara) — 3445 Leŝeŝevo, Miŝajlovgradska obl. — kun ĉi pri ĉt.

GDR

MICHEL HELWIG (25-jara) — 1307 Eberswalde-Finow 3, Dimitrov strasse 22 — kun ĉi pri ĉt.

HUNGARIO

MANA FIESZLIASZER — 2613 Rád, Petöfi ut. 10 — kun ĉi pri ĉt.

EVA BZÜTS (15-jara) — 5100 Jászberény, Toborzo u. 27 — kun ĉi pri ĉt.

JAPANIO

CUKURU HARADA (25-jara, fraŭlo) — 862 Kumamoto, Hakuzan 2-7-4 — kun fraŭlino el Eŭropo, edziĝocele.

POLLANDO

IWONA PAWLIKOWSKA (18-jara) — 85-734 Bydgoszcz, ul. Boczna 22/1 — kun ĉi pri muziko kaj turismo.

ADAM SZCZEPANSKI (50-jara) — 31-067 Krakow, ul. Chmielowskiego 4/8 — kun ĉi pri turismo kaj medicino.

HANNA PYSZNAK (28-jara, fraŭlino, instruistino de biologio) — 63-910 Miejska Górka, ul. Kobylins-

ka 48 — kun ĉi pri protekto de naturo kaj turismo. PRZEMYSŁAW MARKIEWICZ (14-jara) — 57-200 Zabkowice Śląskie, Osiedle XX-lecia 46/15 — kun ĉi pri literaturo, bestoj kaj flugmodeloj.

STANISŁAWA NANIK (55-jara, oficistino) — 80-765 Gdansk, str. Elblaska 22/12 — kun ĉi pri ĉt.

IWONA KSIEDZYNA (23-jara) — 49-200 Grodków, ul. Rynek 31/4 — kun ĉi esperante, germane, france kaj angle pri lingvoj, vojaĝado, slojdo, faŭno, literaturo, teatro, kino kaj muziko.

MARZANNA NIEZABITOWSKA (25-jara) — 37-200 Przeworsk, ul. Rynek 20 m. 17 — kun ĉi pri turismo, geografio kaj sporto.

PAWEŁ SOLTYK (25-jara) — 26-600 Radom, str. Gen. Bema 3 m. 43 — kun ĉi pri muziko, sporto kaj turismo.

MAREK KRYCIA (18-jara) — 51-690 Wrocław, ul. Lampego 4 — kun ĉi pri muziko, sporto.

SOVETUNIO

MARIUS DIBLA (22-jara, studento) — 232035 Vilnius, Taikos 3830, Litova SSR — kun ĉi pri ĉt.

REMIGIJA GRINCIENE kaj ARŪNAS GRINCAS (25-jara, geedzoj) — 233026 Kaunas, Rasytes 38-5, Litovio—USSR — kun ĉi angle kaj esperante, pri ĉt.

VILMA GRINCAITE (17-jara, studentino) — 233026 Kaunas, ul. V. Niukos 6-33, Litova SSR — kun ĉi esperante kaj angle, pri ĉt.

ARVYDAS KAZLAUSKAS (22-jara, studentino) — 233000 Kaunas, Demokrato 31-29, Litova SSR — kun ĉi pri ĉt.

RITA LUINEVIČIENĖ (30-jara) — 235291 Biržai, N. Radviliškis, „Aušros“ 9-4, Litovia SSR — kun Bulgario, Hungario, Ĉinio, Japanio pri literaturo, naturo, arto kaj kulturo.

DAGESTANA E-klubo — 367002 Maŝaĉkala, Lenina 119-40 (Vladimir Abramov), USSR — kun ĉi pri ĉt.

ALEKSEJ MJASNIKOV (25-jara) — 157610 Ŝarja 5, Kostromskaja oblast, ul. Jubilejnaja 5, kv. 5 USSR — kun ĉi pri historio, literaturo, fotografio.

RUSLAN ZAĤAROV (16-jara) — 248011 Kaluga, ul. Olgavskaja 17-12 USSR — kun ĉi pri filatelo, moderna muziko, teniso.

ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 12/1988)

DEPARTEMENTO DE VARNA

9000 Varna
ul. „Batak“ 4 ap. 18
Ivanka Stojanova
E-societo „Albatroso“

9270 Suvorovo
Nikola Vâlčev
E-societo „Paco“

9700 Ŝumen
P. K. 60 Ĥristo Enčev
E-societo „Vekiĝo“

9750 Madara
Stojan Anev
E-societo

9850 Preslav
ul. „Stambolijski“ 54
d-ro Georgi Popov
E-societo „Ora Epoko“

9870 Vărbica
ul. „Septemvrijsko vâstanie“ 52
E-societo „Suno“

9300 Tolbuhin
ul. „Dojran“ 4
Elena Popova
E-societo „Paco“

900 Varna
ul. „Kl. Gotvald“ 3
P. P. „Uspeŝ“ — Dimčo Dimov
E-societo de blinduloj „Lumo“

(Daŭrigo en n-ro 2/1989)

Prognozado de la bulgara modo kaj dezajno estas jam tradicia agado ĉe ni, daŭranta jam pli el kvaron-jarcenton. Sezonon post sezono la bulgaraj modistoj kreas belecon kaj ĉarmon por laboraj kaj festaj tagoj, kreas la modon de la hodiaŭa kaj morgaŭa tago — samtempe praktikan kaj artisman, ĉiam allogan kaj varian.

Modo — rava nocio, kiu enkondukas nin en mondon de koloroj kaj formoj, de avangardaj ideoj kaj elprovitaj klasikaĵoj. La modo vivas, ĝi kreiĝas ĉiutage — malnova kiel la mondo mem kaj ĉiam nova kaj juna por la antaŭstaranta sezono.

Kia estos la moda linio dum 1989? Jen demando tre aktuala en la komenco de ĉiu nova jaro. Nun ĉiuj tendencoj en la virina modo kondukas al substrekado de la virineco. Formiĝas du ĉefaj direktoj — urba kaj sporta stilo. Sed triumfo de la klasika stilo estas la unua specifaĵo, de kiu dependas ankaŭ la ceteraj proporcioj kaj detaloj. La nova klasika stilo trudiĝonta kiel



ĉe virinaj, tiel ankaŭ ĉe viraj vestoj, diferenciĝas per pureco de la linio. Ŝanĝiĝas la kolora solvo de la ensemblo. La inspiro venas de la modaj ideoj de la 50-aj kaj 60-aj jaroj.

La nova fasono de la vestoj estas evidente simpligita — malgranda amplekso, rekta silueto sekvanta la linion de la korpo — trapezoforma, ovala, „X“-forma.

La ŝultroj de la vesto, kies formo dum la lastaj jaroj prezentas karakteran modan elementon, daŭre restas plivastigitaj kaj rondformaj. Substrekita estas la linio de la talio kaj de la koksoj. Tiu ĉi moda tendenco faras la virinan figuron aspekti pli svelta, preskaŭ junulina. En disputoj pri la longeco de virinaj vestoj — tiu ĉiam disputinda problemo, superregas la mallongigita proporcio, sed paralele kun ĝi havas lokon ankaŭ tiu ĝis la suro.

Ĉe la nova moda linio la detalaĵoj estas pli malmultaj kompare kun la pasintjara: kolumoj — unualoke ŝalformaj; altaj rektaj, grandaj kolumoj; poŝoj — prefere internaj, kun kovriloj. Brilaj galonoj kaj grandaj steboj substrekas ilian konstruon.

Por la printempo intereson prezentas precipe la virina palto. Se vi ankoraŭ ne akiris novan palton, sed intencas fari tion, turnu atenton al la alĝustigitaj mo-




deloj, sed ankaŭ al la „treanchcoat“, kiu laŭtradicie estas inter la plej oportunaj klasikaj vestoj en la virina vestŝranko. Aparte aktualaj ĉi-jare estas paltoj kun longeco 3/4 kaj 7/8.

Kostumoj estas ĉiam preferataj dum la printempo. Ĉe ili plej klare manifestiĝas la modaj tendencoj; karakterata estas la rekta kaj „X“-forma silueto, plilarĝigitaj ŝultroj kaj substrekita linio de la korpo. La longeco de la jakoj estas varia: longaj, mallongaj en kombino kun jupo ĝis la suro. Moda tendenco estas la tre praktika kostumo kun pantalone.

La pantalone, kiu nun okupas gravan lokon inter la vestoj de la moderna virino, estas proponata en kelkaj variaĵoj: ĝuste laŭ la korpo, mallarĝiganta malsupre kaj larĝa laŭ sia tuta longo. Ĝin karakterizas alta talio, zonoj kaj refaldoj.

Do kiel vi vidas, la proponoj — kiel por la tuta jaro, tiel ankaŭ por la printempo estas tre variaj. Kaj ni esperas, ke ĉiu virino, konforme al siaj aĝo kaj figuro, trovos inter ili la plej konvenan modelon, por esti ĉiam eleganta.

Mila MLADENOVA





LĂCEZAR STANŢEV

APUD LA NOVJARA ARBETO

*Avo Frosto, kie estas?
Malfruiĝas en la nokt'.
Ne forgesu min kaj venu
kun donacoj en la korb'!*

*Kara birdo de l'arbeto
flugu for, konduku lin!
Sur la sledo, trans montetoj,
veni li kun Neĝulin'!*

*Brilu vi, steleto, brilu!
Lumu ĉiam pli kaj pli!
De la pinto de l'arbeto
lian vojon montru vi!*

*Mia kato ne eltenas,
branĉon tuŝas per pied',
Avon Froston milde vokas
per arĝenta tintilet'!*

*Avo Frosto malfruiĝas —
ĉu por l'aĝo? Ne, pro l'neĝ'...
Ho, rapidu! Ne forgesu
la donacon — bellibret'!*

Tradukis: Maria SLAVĈEVA

